

Monato

INTER

SENDEPENDA



**Ĝis la morto
nin disigos**

Kotizoj de MONATO kaj LA JARO 1994*

Kiom?

		MONATO		LA JARO	
		surf.	aere	surf.	aere
Aŭstralio	AUD	52	61,5	8,6	12
Aŭstrio	ATS	450	515	63	87
Belgio	BEF	1250	1450	180	250
Britio	GBP	25	29	3,6	5,0
Danio	DKK	250	288	35	49
Finnlando	FIM	218	253	32	44
Francio	FRF	210	245	30	42
Germanio (ok.)	DEM	64	74	9	12,5
Germanio (or.)	DEM	48	58	7,5	11
Greko	GRD	5500	6860	1020	1500
Hispanio	ESP	3840	4600	680	950
Irlando	IEP	22	26	3,5	4,8
Islando	BEF	1000	1200	180	250
Israelo	NLG	55	66	10	14
Italio	ITL	56000	65000	8000	11200
Japanio	JPY	5900	6760	775	1075
Kanado	CAD	49	57	7,5	10,3
Luksemburgo	LUF	1250	1450	180	250
Nederlando	NLG	69	80	10	14
Norvegio	NOK	259	301	38	53
Nov-Zelando	NZD	66	79	11	15
Portugaliao	PTE	4900	5880	880	1220
Sud-Afriko	BEF	980	1180	180	250
Svedio	SEK	290	337	44	61
Svislando	CHF	59	68	8	11
Tajvano	BEF	1100	1300	180	250
Usono	USD	42	49	6,25	8,75

Aliaj landoj: **Petu la tarifon de la landa peranto**, aŭ, se tiu ne ekzistas, de la eldonejo: **Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Telefono +32 32 34 34 00; telekopiilo +32 32 33 54 33.**

Noto: Se vi pagas kotizon por persono en alia lando, validas la tarifo de via lando, ne tiu de la lando de la abonoto.

* Kotizoj validaj por pagoj kiuj atingas la eldonejon antaŭ la 31a de decembro 1993.

Al kiu?

Pagu al la landa kotizperanto...

Argentina: F-ino Marta Solis, Tucumán 50, RA-2600 Venado Tuerto (Santa Fé).

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Post Office Box 230, Matraville, N.S.W. 2036. Tel. (02) 311 2246.

Aŭstria: Aŭstria Esperanto-Movado, Margarethengürtel 100, 1050 Wien. Banko: Die Erste, konto 000-99511.

Belga: Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43).

Brazila: Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084 Brasilia.

Brita: Esperanto-Asocio de Britio, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF (pĉk. 54 851 0008).

Bulgara: Press Esperanto, str. Jeko Dimitrov 80, BG-1303 Sofia.

Dana: Astrid Birkbak, Rugvenget 46, DK-2750 Ballerup (pĉk. 1705121 Girokontoret Heje Taastrup).

Finna: Oy Mendoservo Ak, Kivistöntie, SF-05510 Hyvinkää, pĉk.427 72-2.

Francaj: Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75000 Paris

(pĉk.: 855-35 D Paris).

• Esperanto-Klubo de Metz, 36 rue St. Marcel, 57000 Metz.

Germanaj: Hilde Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg (pĉk.: Nürnberg 650 92-858 (BLZ 760 100 85)).

• Esperanto-Centro Paderborn, Postf. 1450, 33044 Paderborn (pĉk.: Hannover 259658-301).

• Libera Esperanto-Asocio, Am Stadtpfad 11, D-65760 Eschborn (pĉk.: Karlsruhe 2125 01-759).

• Literatura-Servo „Espero”, Rolf Beau, Jacobstr. 9, D-04105 Leipzig (Deutsche Bank Leipzig konton-ro: 1195106 (BLZ 86070000)).

Greka: Helena Esperanto-Asocio, Agiu Meletiu 54, 11252 Ateno.

Hispanaj: Juan Azcuénaga Vierna, General Dávila, 127, portal 7, 2º izda., Santander (pĉk.: 03548531).

Hungara: Libroservo KFT, Pf 54, H-1426 Budapest.

Irlanda: Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12.

Islanda: Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík.

Israela: Natan Heller, 77 Kazenelson str., IL-53270 Givatajim (konto: Bank Leumi 081810/01).

Itala: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204).

Japanaj: KLEG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Osaka-hu 561.

• Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162.

Kataluna: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions, Agència 461, konto 550/53).

Kanada: Kanada Esperanto-Asocio, P.O. Box 2159, Sidney, B.C., V8L 3S6.

Korea: Korea Esperanto-Asocio, C.P.O. kesto 4258, Seoul-100.

Kroata: Kroata Esperantista Unuiĝo, Trg Burze 2, HR-41000 Zagreb.

Luksemburga: LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12).

Nederlanda: Esperanto-Centrum Nederland, Riouwstraat 172, 2585 HW 's Gravenhage (pĉk.: 3583975).

Norvega: Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5.

Nov-Zelanda: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1. Telefono kaj telekopiilo: (4) 473-0847.

Portugala: Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. João Couto, 6, R/C.-A, P-1500 Lisboa.

Pola: P.W.H. Nepo, ul. Broniewskiego 77 m. 137, PL-01-865 Warszawa.

Sud-Afrika: Colin Beckford, P.O. Box 1227, Cape Town-8000.

Svedaj: Esperanto-Skolan, Barnhusgatan 8, 11123 Stockholm.

• Sveda Esperanto-Federacio, Södra Rörum pl 455, S-24294 Hörby.

Svisa: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel.

Tajvana: Tajvana Esperantista Asocio, P.O. Wang Chung-yi, No 13, 2 Alley 40 Lane Chung Yung St. Shih Lin, Taipei.

Usona: ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530.

Venezuela: J.E. Bachrich, Apartado 70782, 1071A Caracas.

aŭ pagu rekte al la eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

– Se en via lando ekzistas poŝtĉekonta sistemo, vi povas pagi al poŝtĉekkonto n-ro 000-0265338-43 (poŝtĉek-oficejo Bruselo, Belgio), de Flandra Esperanto-Ligo;

– Se en via lando ekzistas Euroĉekoj, vi povas sendi tian ĉekon. La valuto devas esti la **belga franko (BEF)** kaj dorso de la ĉeko devas troviĝi **via bankkartnumero**;

– Posedantoj de VISA-, MASTERCARD-, EUROCARD- aŭ ACCESS-kreditkarto simple sciigu per subskribita karto sian numeron kaj validodaton;



– Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon. La kontkodo de Flandra Esperanto-Ligo estas fela-x;

– Se vi havas konton en usona banko, sendu al ni ordinaran usonan bankĉekon. En tiu kazo la valuto devas esti la **usona dolaro (USD)**.

Nur se vi ne povas pagi laŭ unu el la kvin supraj vojoj, uzu la jenajn, kiuj tamen kostos al vi multe pli:

– Sendu al ni ordinaran bankĉekon el via lando, prefere en belga valuto. Aldonu al la sumo 225 BEF aŭ ties egalvaloron plus la sumon kiun fakturos via banko. Bv. informiĝi tie. Sur la ĉeko vi skribu la nomon **Flandra Esperanto-Ligo**.

– Sendu al ni internaciajn respondkuponojn. Ili validas, se ili estas nur maldekstre stampitaj. Unu respondkupono egalas al 28 BEF.

Anonc-tarifo

	Grandeco mezuroj mm	prezo BEF
1/1	251 x 172	9900
3/4	188 x 172	7500
2/3	251 x 112	6700
1/2	dukolumna 188 x 112	5000
	trikolumna 124 x 172	
1/3	unukolumna 251 x 54	3400
	dukolumna 124 x 112	
1/4	unukolumna 188 x 54	2800
	trikolumna 59 x 172	
1/6	unukolumna 124 x 54	2000
	dukolumna 59 x 112	
1/12	unukolumna 59 x 54	1200

Aliaj formatoj: 50 BEF/cm²

Koloroj: Por aldono de koloro, pluspago de 3000 BEF.

Anoncetoj: 56 mm larĝa, 1 linio 40 BEF (minimume 6 linioj; ne eblas uzi fotojn, desegnaĵojn, emblemojn, kolorojn).

Suplementoj: Por aliaj paĝoj ol paĝo 2 10 % pluspago (rabatebla). Pri apartaj reklamfolioj por kunsendado aŭ alvinktado kontaktu la eldonejon. Por loĝantoj el la Eŭropa Komunumo aldoniĝas la aldonvalora imposto (AVI) de 19,5 %.

Rabatoj: Ĉe ripeto de la sama anonco dum du sinsekvaj numeroj 5 %, ĉe 3- ĝis 5foja aperado dum sama jaro 10 %, ĉe pli ol 5foja aperado dum sama jaro 20 %; 5foja ripeto de sama anonceto: -40 %.

Monato

internacia magazino sendependa
por politiko, ekonomio kaj kulturo

monata revuo en la internacia lingvo Esperanto legantoj en 75 landoj fondinto: Stefan Maul 14a jarkolekto aperas principe la 1an de ĉiu monato abontarifo varias laŭlande; petu ĝin de la eldonejo ■ **eldonejo:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, elektronika poŝto: 100272.1601@compuserve.com; ĝirkonto 000-0265338-43 nome de Vlaamse Esperantobond, Antwerpen valida anonctarifo: n-ro 6 kompostita kaj presita en la eldonejo por adresŝanĝoj nepre menciui la kodon kiu troviĝas dekstre sur la adreslipo ■ **redaktoroj:** William Auld, Gerrit Berveling, Tim Carr, Mark Fettes, Marco Gazzetta, Evgeni Georgiev, Paul Gubbins, Girvan MacKay, Stefan Maul, Seán Osborne, Paul Peeraerts, Roland Rotsaert, Krys Ungar, Guido van Damme, Jean-Pierre VandenDaele 150 konstantaj korespondantoj en 45 landoj ■ aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj) represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto kopi-rajto ĉe la eldonejo ne sendu registritajn leterojn ekzistas kaseta versio de MONATO por blinduloj; mendu ĝin pagante 20 NLG al UEA, konto NORA-F *verantw. uitgever:* Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen MONATO ne nepre reprezentas la opinion de l' eldonejo.



Enhavo

Noticoj	4
El mia vidpunkto	5
Leteroj	6
Politiko	8
Moderna vivo	12
Scienco	15
Ekonomio	17
Turismo	18
Lingvo	19
Libroj	22
Novelo	23
Eseo	24
Arto	26
Hobio	28
Enigmoj	29
Poezio	30

Kontraste al kelkaj aliaj internaciaj revuoj, difinita numero de MONATO ne havas unu specifan temon. MONATO ne eldonas numerojn nur pri, ekzemple, orienta Eŭropo aŭ la ekonomio en Nov-Zelando. Tamen fojfoje, ĉu aŭtomate, ĉu hazarde, ekestas temo. Vi konstatos, ke en tiu ĉi numero pluraj artikoloj temas pri la farto de maljunuloj en nia socio kaj alia aro pri ateismo.

En la artikolo „El mia vidpunkto” en paĝo 5, Stefan Maul, germano, donas sian opinion pri la situacio de maljunuloj en fleg-hejmoj. Ĉu estas hazardo, ke kelkajn paĝojn poste en la rubriko „Moderna vivo” vi trovos kontribuon de Ralph Harry, aŭstraliano, pri la rajtoj de maljunuloj en fleg-hejmoj? Interese estas sendube legi ambaŭ unu post la alia kaj kompari.

Certe ne hazardo estas la fakto ke vi legos plurajn kontribuojn pri ateismo. En aŭgusto (paĝo 27) aperis eseo de Gilbert Ledon titolita „Kio estas ateismo?”. Kutime eseoj de Ledon provokas multajn reagojn. Tiel ankaŭ nun. En la nuna numero vi trovos „rebatan” eseon de Bruno Vogelmann, aŭtoro de la libro „La nova realismo” (baldaŭ elĉerpigonta, cetere) kaj plurajn aliajn reagojn en la rubriko „Leteroj”.

La reagoj pri la eseo de Ledon estis tiel multnombraj, ke plurajn ni devis koncizigi kaj multajn aliajn ni simple devis rifuzi. Rifuzi artikolon ne estas agrabla tasko. Ĉiu ja ŝatas vidi „siajn liniojn” publikigitaj. Pro tio la eldonejo ĝojas ke la plimulto de la legantoj senproteste kaj lojale akceptas tiajn rifuzojn aŭ koncizigojn, kvankam fojfoje iu pro tio tuj ĉesigas sian abonon...

Supre de tiu ĉi enkonduko troviĝas la vorto „decembro”. Denove MONATO liveris al vi tutan jarkolekton, 384 plenplenajn paĝojn. Kion por vi alportos 1994?

Nu, kelkajn novaĵojn ni jam rajtas malkaŝeti. Aspekto MONATO iom ŝanĝiĝos. La internaj paĝoj ne plu estos palgrizaj kiel ĝis nun, sed varmblankaj. Estos uzata reciklita paperspeco, farita el blankaj presejaj restaĵoj.

Decidinte tiel, ni sendube kontentigos kaj la porulojn de medioprotektado, kaj la kontraŭulojn de la ĝisnuna grizeta papero!

Ankaŭ enhave vi konstatos ŝanĝon. Aperos ekde januaro nova rubriko: „Komputilado”. Pli kaj pli da legantoj de MONATO insistis pri tio. Sed, nekomputilposedantoj ne tuj ektremu. Ne estos prezentitaj tekstoj por komputistoj, ne por fakuloj. Por tio ja ekzistas aliaj revuoj. MONATO intencas ĉefe regali la legantojn kiuj nur flanke okupiĝas pri komputiloj kaj eĉ tiujn kiuj ne (jam) posedas unu aŭ nur revas pri ĝi.

Havu belajn festotagojn!
La redakcia skipo.



Parolas Varsovio

Jam de 1959 Pola Radio aŭdigas siajn Esperanto-elsendojn ĉiutage. En la elsendo de la 15.30 h. oni aŭdigas novaĵojn kaj trarigardon de la varsovia gazetaro; dimanĉe oni reaŭdigas la leterkeston. En la elsendo de la 22.30 h. post la novaĵoj plej ofte sekvas aktuala komentario. La ondolongoj ŝanĝiĝis ekde la 1a de oktobro. La elsendo de 15.30 h. estas dissendata je la jenaj frekvencoj: 11815, 9540, 9525, 6135, 7145 kHz (25,39, 31,45, 31,50, 48,90, 41,99 m); tiuj de 22.30 h. je: 6135, 5995 kaj 1503 kHz (48,90, 50,04, 200 m). Pli da informoj haveblas de Pola Radio, Esperanto-redakcio, Skrytka 46, PL-00-950 Varsovio.

Ĉu trovi homaranismon?

Kiel eduki al toleremo, kiel forgesigi la rasajn, klasajn kaj naciajn diferencojn kaj prioritigi la interligan komunecan? Ĉu ne ĝuste la religio devas montri la vojon? Ĉu ne la interreligiaj tensioj kaj konfliktoj estas unu el la plej plorigaj ĉapitroj de la homara historio? Jen la centraj demandoj pri kiuj temas la unua Interreligia Seminario Esperantista, Tabor/Ĉeĥio de la 31a de marto ĝis la 4a de aprilo. La seminario estas organizata de ASISTI (Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj), la juna interreligia Esperanto-asocio. Informojn petu de B. Westerhoff, Postfach 500133, D-60391 Frankfurt.

Uzbekio aliĝas al IFK

En oktobro 1993 Uzbekio fariĝis la naŭa eks-sovetia respubliko, kiu aliĝis al la Internacia Financa Korporacio (IFK), la filio de la Monda Banko okupiĝanta pri la privata sektoro. Parolante ĉe gazetara konferenco en Taŝkento, la uzbeka ĉefurbo, William Ryrie, vicprezidanto de IFK, diris, ke ĝi helpas al la uzbeka parlamento formi agadprogramon por allogi eksterlandan investadon kaj aranĝi financadon por komunaj entreprenoj en la minerala, nafta, gasa, turisma kaj agro-industria sektoroj. Sammonate, fininte viziton al Taŝkento, dum kiu li subskribis interkonsenton pri kulturaj kaj diplomatiaj interŝanĝoj, brita ministro pri eksterlandaj kaj komunumaj aferoj Douglas Houg konstatis, ke „grandaj komercaj ebloj ekzistas en Uzbekio”, se oni konsideras ĝiajn riĉajn naturrezervojn kaj la fakton, ke ĝi estas repagipova. Ŝildo

4taga laborsemajno

La germana aŭtofabrika entrepreno VW planas enkonduki kvartagan laborsemajnon ekde la venonta januaro. Tiu decido ne baziĝas sur intertrakta venko de batalema sindikato, sed sur propono de la entreprenestraro por draste ŝpari kostojn fronte al plonĝinta debito kaj kreskanta malprofito. La libera tago estos sensalajra. La alia vojo estus maldungi pli ol kvinonon de la laboristaro.

PEJNO Simono

FEL ekspansias

Pli kaj pli da kunlaborantoj de MONATO sendas siajn manuskriptojn al la eldonejo en elektronika formo. Ili tajpas sian tekston hejme aŭ en la laborejo, kaj ekpedas ĝin tra elektronika reto rekte al la eldonejo. Aliaj liveras siajn kontribuojn sur diskedoj. La granda avantaĝo de tiu sistemo estas ŝparo de tempo. En la eldonejo oni ja ne devas retajpi la tuton. Al la tipoj de disketoj kiuj estas legeblaj en la oficejo de Flandra Esperanto-Ligo (FEL) ĉi-monate aldoniĝis plia speco: post Atari- kaj DOS-disketoj (3,5- kaj 5,25-colaj) FEL nun povas konverti ankaŭ tekstojn sur Macintosh-disketoj al sia sistemo.

Labormerkato malboniĝas

Laŭ raporto de la usona labordepartemento, la labormerkato por junaj kolegio-finstudentoj konsiderinde malboniĝis dum la lastatempa ekonomia malleviĝo. Senlaboreco por tiu kategorio kreskis de proksimume 5 % en 1988 al preskaŭ 8 % (por viroj) kaj 6 % (por virinoj) in 1991. La nombro de junuloj, kiuj trovis altpagitajn laborlokojn, malkreskis de 53,6 % en 1989 al 48,4 % en 1991. Samtempe la kvanto de teknikaj kaj vendistaj laborlokoj kreskis de 33,4 % al 38,2 %. Ŝildo

Radio FMR

La Esperanto-elsendoj de Radio FMR en Tuluzo, Francio daŭros ankoraŭ minimume kvin pliajn jarojn. Tion decidis oficiala instanco en Tuluzo. La frekvenco de Radio FMR ekde nun estas 89,1 MHz (por la regiono de Tuluzo) kaj 94,4 MHz (por la regiono de Montauban). La Esperanto-elsendoj okazas vendrede ekde la 16a h. loka tempo (universala tempo 15a h. de oktobro ĝis marto – 14a h. de aprilo ĝis septembro). Bedaŭrinde la disaŭdigoj estas kaptoblaj nur loke.

Militistaabelo

Antaŭ kelkaj jaroj Francio kaj Germanio decidis krei inter si „Eŭrokorpuson”, nukleon de ebla estonta komuna eŭropa armeo. Poste Belgio aliĝis al tiu korpuso. La 5an de novembro, kiam la ministroj pri defendo de la tri menciitaj landoj solene inaŭguris en Strasburgo la novan Eŭrokorpuson, la belga ministro Leo Delcroix [Delkŭa], parolante en la nederlanda, insistis ke ankaŭ tiu lingvo estu oficiala en la korpuso. Lia franca kolego tuj respondis, ke tio neniam okazos. Sub minaco ke Belgio retiriĝos el la Eŭrokorpuso, kelkajn tagojn poste oni aldonis la nederlandan al la oficialaj lingvoj.

E.S. kaj P.P.



Leo Delcroix, belga defendo-ministro.

Helpe al orienta Eŭropo

„Amikoj sen landlimoj” deziras disvolvi solidarecon inter la homoj kolektante kaj disdonante vestaĵojn, nutraĵojn kaj eĉ meblojn. Ĝi intervenis en 1989 en Orient-Berlino, en 1990 en Rumanio kaj en 1992 en Kroatio, Bulgario kaj Ruslando. Se vi deziras iel helpi, skribu al Amikoj sen Landlimoj, BP/73, F-47302 Ville-neuve-sur-Lot Cedex, Francio.

Philippe DESFORGES

Prevento kontraŭ narkotaĵoj

Litova polico informis, ke ĉirkaŭ 10000 litovoj uzas narkotaĵojn. La ĉefaj en Litovio estas trunketoj de papavo, lakto de opio kaj kanaboj. En 1991 la polico konfiskis 329 kg da papavaj trunketoj kaj en 1992 eĉ 1500 kg. Laŭ la polico en Litovio kruciĝas vojoj de drogaĉa kontrabando el Kazaĥio al la regiono de Kaliningrad kaj el Ukrainio al Sankt-Peterburgo.

Pli kaj pli fortiĝas la ideo ĉirkaŭi la baltajn landojn per iuspeca ringo, kiu barus la drogaĉvojojn el mezaziaj landoj al Eŭropo kaj el Eŭropo al eksaj sovetiaj respublikoj.

Laimius STRAŽNICKAS

Egoismo de partioj

Kompare al la problemegoj, kiujn frontas la reformŝtatoj en orienta Eŭropo, la problemoj en okcidentaj industrilandoj povus ŝajni bagatelaj. Tamen ankaŭ en tiuj landoj ĝenerala ekonomia krizo kaj ŝanĝoj pro modernaj produktmetodoj kondukis al problemoj; granda senlaboreco kaj socialaj perturboj estas sekvoj, parte eĉ jam mizeriĝo de kelkaj sociaj tavoloj. Do necesas ŝanĝi kaj adapti malnovajn leĝojn, reformi strukturojn kaj parte krei novajn leĝojn responde al novaj cirkonstancoj kaj novaj fenomenoj.

Unu el tiuj ĉi fenomenoj estas la konstanta pligrandiĝo de l' nombro de maljunuloj. Iam epidemioj zorgis pri proporcio inter generacioj, sed nun la proporcioj estas aliaj: pli kaj pli multaj junaj, laborantaj homoj devas garanti vivbezonojn de pli kaj pli multaj maljunaj. Danke al forigo de epidemioj, ĝenerale bona sanprizorgado kaj progreso en medicino, homoj multnombre fariĝas maljunaj - tamen ja malsaniĝas. Gravajn malsanojn oni povas kuraci, sed ne ordinaran malsanecon kaŭzitan de maljuniĝo. Do maljunuloj ofte bezonas konstantan flegadon, ĉar ili ne plu povas mem zorgadi komplete pri si. Ĉar tion ankaŭ familianoj ofte ne povas fari, estiĝis specialaj flegohejmoj.

Bezono de flegasekuro

Tiuj hejmoj estas ege kostaj, ĉar flegadi ne kapablas maŝinoj kaj aparatoj, tion povas fari nur homoj peze laborantaj, kiuj rajtas je bona salajro. Tre ofte nek la flegatoj mem nek iliaj familianoj havas la necesan monon por pagi tion. Kiel solvi ĉi tiun problemon, kiu koncernas la tutan modernan socion? Logika respondo estas krei apartan flegasekuron, kiu kovras la kostojn.

Simpla respondo, tamen tiom simple la problemo ne estas solvebla, kiel montras la ekzemplo de Germanio. En tiu ĉi lando oni diskutas la temon jam de preskaŭ 20 jaroj, sed nur en 1993 finfine maturiĝis konkreta leĝopropo. Ĝuste ĉar estas tutsocia afero, ĉiuj veraj fakuloj scias, ke plej logika kaj taŭga solvo estus financi flegasekuron per impostoj. Ankaŭ la germana ministro, sub kies aŭtoritato troviĝas la afero, tre bone scias tion. Sed neniu el la regantaj partioj kuraĝas diri tion publike, timante malvenkon en la venontaj elektoj - jam oni vole

nevole devis altigi impostojn por financi problemojn estiĝintajn pro unuigo de l' du Germanioj.

Netaŭga kompromiso

Do la leĝpropono estas komplika miksaĵo kun diversaj financfontoj. La fakuloj displukis ĝin kiel komplete netaŭgan, de ĉiuj flankoj torentis protestoj. Sekve diskutado kaj disputado rekomenciĝis, kun plej absurdaj proponoj. Opozicia socialdemokrata partio totale rifuzis ĝin. Fine oni havis la bonan ideon, trovi pli taŭgan solvon helpe de komuna grupo de fakuloj el ĉiuj parlamentaj partioj. Tiun ĉi metodon oni sukcese aplikis laste ĉe reformo de l' pensia asekuro, kiun oni devis adapti al novaj cirkonstancoj. Do oni interkonsentis pri loko kaj dato - sed heve, la malgranda liberala partio, kunreganta en koalicio kun kristandemokrataj partioj, lastmomente nuligis la interkonsenton. Kurioza manifestacio estis kulmino de l' politika spektaklo: la socialdemokrataj delegitoj tamen venis al la nuligita kunsido, kaj restis inter si...

Grup-interesoj

Estas precipe la liberala partio, kiu bremsas, pro klara intereso: iliaj adeptoj estas precipe entreprenistoj, kiuj unuflanke mem ne bezonas flegasekuron kaj aliflanke do ne estas pretaj, kunfinanci ĝin. Por kontentigi ilin oni do proponis monstraĵojn, ekzemple ke laboristoj rezignu pri du ferioj aŭ ke oni forstreku en la kalendaro du festo-

tagojn kaj uzu la tiel gajnitan monon por pagi en la kason de flegasekuro. Kiel ajn, la regantaj partioj fine elektis ridindan proceduron: oni akceptis la leĝproponon en la parlamento kontraŭ la voĉoj de l' opozicio, bone sciante, ke la dua ĉambro, en kiu opoziciaj socialdemokratoj havas plimulton, rifuzos la leĝprojekton. Tiel okazis, kaj la projekto eniris la mediacian komisionon, kiu devas trovi kompromison. Kia ajn ĝi estos, ĝi estos netaŭga, malbona.

Ĉu demokratio ne funkcias?

Tiu ĉi ekzemplo estas nur unu el multaj, kaj similajn ekzemplojn ni nuntempe trovas en pluraj okcidentaj ŝtatoj. Ĉu do la parlamenta, plurpartia demokratio ne plu funkcias? Evidente diversaj, ankaŭ tradiciaj politikaj partioj zorgas nur pri siaj propraj interesoj laŭ la moto „ĉiurimede teni la potencon“, do ne fortimigi siajn adeptojn per inteligentaj solvoj, se tiuj solvoj kaŭzos koston al la adeptoj. Tia egoisma konduto, kompreneble, ne atentigas la bezonojn de l' tuta socio, ne la bonfarton de la ŝtato. Observante tion, oni ne miru ke homoj rezignacias kaj perdas komplete respekton al partioj kaj politikistoj. Laŭ opiniondoj la reputacio de politikistoj en Germanio neniam estis tiom malaltega kiel nun. Sekve konstante malkreskas emo de civitanoj, voĉdoni ĉe elektoj. Do iuj partipolitikistoj jam proponas, ankaŭ en Germanio enkonduki leĝan devigon voĉdoni. Sendube tiel ili ne savos aŭ regajnos sian reputacion. Prefere ili devigu sin mem, nome al komunsento anstataŭ egoismo kaj grupintereso. Laŭ la germana konstitucio ĉiu parlamentano havas la devon zorgi pri bonfarto de ĉiuj, ne nur de la propra kaj de tiuj, kiuj elektas ŝin aŭ lin.


Stefan MAUL



Religiuloj, senreligiuloj, ateistoj

La letero de Jiri Proskovec (MONATO, 1993/10, p. 7) nenion klarigas. Unue religiuloj ne nepre estas tiuj, kiuj blinde sekvas ian religian doktrinon. Mi opinias ke mi estas klera religiulo, de post mia studado de religiaj sciencoj en altlernejo. Sed laŭ la difino de Jiri Proskovec mi apartenas al la senreligiuloj, ĉar „ili estas pli malpli liberaj de religiaj doktrinoj”. Laŭ Jiri Proskovec mi estas eĉ ateisto, ĉar „ateismo estas konsciiĝo pri karaktero de la ekzistanta materia kosmo, bazita sur racio ekkono kaj pripenso”. Ĉu la fak-delegito de UEA pri ateismo ne pensas same tro simple kiel la papo aŭ kiel fundamentistoj? Fine mi protestas kontraŭ la opinio ke „por kristanoj islamanoj estis ateistoj”, ĉar ĉiam oni sciis ke ili kredis kaj kredas je unu Dio, kies nomo Alaho, kies profeto Mohamedo...

Hubertus M. Schweizer, Germanio



Kio estas ateismo? Kaj kio religio?

Fakte iom ŝokis min la kruda kaj senbaza respondo de Jiri Proskovec (MONATO, 1993/10, p. 7) pri ambaŭ supre menciitaj demandoj. Laŭ li religio estas „blinde sekvi ian religian doktrinon”. En tio mi neniel rekonas nek mian propran eklezion, nek la membrojn de multaj aliaj eklezioj kaj de ne-kristanaj religioj. Religio signifas baze iamaniere rekoni la misteron. Rekoni la intuician scion pri io nedifinebla, kion ni homoj nomas „dio” aŭ „eterno” aŭ kiel ajn. Ne eblas klarigi en mallongan leteron tion komplete. Sed kiel ajn: Se religio estu „blinde akcepti doktrinon” almenaŭ mi persone neniel pretus aparteni al iu ajn religio! La alia respondo estas same ŝoka: ke ateismo „ne estas kredo [pri] neekzisto de dio

[...] sed konsciiĝo pri karaktero de la ekzistanta materia kosmo, bazita sur racia ekkono kaj pripenso”. Povas esti, ke por la aŭtoro tio priskribas ateismon, sed kiel ajn bedaŭrinde por li, se rigardi filozofie, ankaŭ tiu lia konvinko estas „kredo” [nun pri ne-ekzisto de dio] – sed kredo ĝi estas kaj restas. Nek ekzisto nek neekzisto de dio estas pruvebla – kaj fakte tio eĉ ne estas interesa temo! Aliflanke, la racia ekkono aŭ konsciiĝo pri la materia kosmo tute neniel rilatas malakorde je religieco. Mi konsilu al s-ro Proskovec foje legi seriozan verkon pri religio. Inter religio, agnostikismo kaj ateismo la diferencoj efektive ne estas tiel absolutaj.

Gerrit Berveling, Nederlando

Spirita vivo de la ateistoj

Jen esprimo de s-ro Ledon je la fino de lia eseo „Kio estas ateismo?” (MONATO, 1993/8, p. 27) Ĉu tiu esprimo ne estas multe pli „absurda” ol kredo je dio? Eĉ plej inteligentaj homoj ne povas kompreni ĉion en la universo; nek ĉion pri la homa vivo kaj pri ĝia celo; sed ĉu la fakto ke t.n. racia homo ne povas kompreni ĉion, estus pruvo ke dio ne ekzistis? Se iu fama lingvisto rigardus la Eifel-turon, li verŝajne ne povus kompreni ĉiujn faktorojn kiuj tenis staranta ĝin ekde 1889, malgraŭ la ventegoj, pluvegoj kaj fulmotondroj. Ĉu la sendube racie pensanta lingvisto, pro la fakto ke li ne povas kompreni ĉion pri la turo, arogus sin diri, ke estas absurde, kredi ke tre kapabla inĝeniero desegnis ĝin? Sciencistoj „racie” pruvis ke la tero kaj la universo ekzistis jam milionojn da jaroj antaŭ ol ekzistis homoj. Ankaŭ ke ĉio en la universo, de mikro- ĝis makrokosmo, de partoj de atomoj ĝis konstelacioj, moviĝas en sia trako; ĉio havas funkcion en la tuto. Ĉu s-ro Ledon supozas ke ĉi ĉio estiĝis hazarde? Ĉu li estas blinda por la superhoma inĝenuco per kiu ĉio estas planita kaj funkcias?

H.W. Appel, Sud-Afriko

Ateistoj kaj aliaj

Gilbert Ledon (MONATO, 1993/8, p. 27) difinas ateismon kiel spirito-staton de homoj, konsiderantaj ke la intelekta kapablo manifestiĝas laŭ du manieroj, unue per la racio, kio estus la plej grava, due per la mistiko, kiu al nenio kondukus, krom ĝuste al la religioj, aŭ al la abstraktaj esprimoj de poetoj, filozofoj, k.s. Li tute forgesas ke ĉiu homo, vole-ne-

vole, havas sian metafizikon, sian propran mondovidon. La germanoj diras *Weltanschauung* (alrigardo al la mondo). La sola racio ne povas solvi ĉiujn problemojn. S-ro Ledon mem akceptas tion. Di-kredantoj inkludas la religiajn klarigojn en sian metafizikon; ateistoj inkludas sian propran intuicion, aŭ la mondovidon de iu filozofo je kiu ili kredas. Multaj di-kredantoj ne tute akceptas la opiniojn de sia eklezio, precipe rilate al moralo. S-ro Ledon trosimpligas iliajn mensostatojn, kaj eraras, kredante ke ateistoj, eĉ malplimulto, pravas kontraŭ di-kredantoj. Laŭ mia opinio, neniu povas diri kiu pravas. Probable estas vero ambaŭflanke, ĉar diversaj estas la di-kredantoj, kiel la ateistoj.

Raymond Marty, Francio

Absurdo kaj ateismo

En la eseo „Kio estas ateismo?” (MONATO, 1993/8, p. 27) la aŭtoro post priskribo de ateismo, kunsentas pri konkludo ke la mondo (homaj vivo kaj morto i.a.) estas perceptata kaj juĝata de la homa menso kiel absurdo. Do, kio signifas absurdo? Ja nepre temas pri tio kio estas absolute neasertebla ĉar ĝi kontraŭdiras la raciecon de la homa penso. De kio oni konkludas ke la mondo tute ne ekzistas aŭ, se ĝi ekzistas, devas havi kaŭzan klarigon. Tio devenas ĝuste de la koncepto pri absurdo ĉar la menso rifuzas ĉian trian solvon. Kian kulpon aŭ kian kapricon plenumas la homa menso, se estaĵo estis venigita en ekziston kvankam neantaŭvidebla aŭ kontraŭdiranta sian inklinon? Tiu klarigo pri absurdo kaj neceso eliri de ĝi antaŭiras intervenon de la internaj inklinoj (mistikaj aŭ raciemaj) de la homa menso, kiu povas poste ĝoji aŭ suferi pro tia konkludo. Unu afero estas malkovri la nekaŭzitan kaŭzon, alia afero estas koni profunde kaj klare la personecon de la kaŭzo. Unu afero estas racie malkovri, alia afero estas simpatie aŭ ne akcepti ĝin. (Kaj tria afero estas uzi la Dimalkovron por ekspluati.)

Zecchin Armando, Italio

Pri la enhavo de leteroj respondecas la aŭtoroj mem. La redakcio havas la rajton mallongigi leterojn. Reagoj al artikoloj ricevas prioritaton. Skribu al:
FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MONATO (Leteroj)
Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
Belgio

Keskseksa?

Mi frande ĝuas ĉiun novan serieron de „La mondaj lingvoj” fare de Bradley Kendal. Koncerne la pecon pri la franca (MONATO, 1993/10, p. 23), mi tamen havas kelkajn rimarkojn. La esprimo per kiu li ekzempligas la teruraĵojn de la franca ortografio, *Qu'est-ce que c'est que ça?* [kesk(e)sek(e)sa] ja estas pene literumebla, sed ĝi ne plu estas la norma frazo por „Kio estas tio?” Ĉi lasta iom malpli longas: *Qu'est-ce que c'est?* [keskese]. La Kendal-a frazo enhavas kromsignifon de surpriziĝo: „(Ho), kio do/diable estas tio?” Cetero, ekzistas du formoj tute mallongaj por „Kio estas tio?”: unu, *Qu'est-ce?* [kes] pli-malpli formortis pro sia troa mallongeco, sed la alia, *C'est quoi (, ça)?* [sekŭa(sa)] vigle vivas en la komunuza lingvaĵo. Plue, *Qu'est-ce que c'est que ça?* ne analiziĝu kiel

„Kio estas tiu ke tiu estas ke tio?”, sed pli-malpli „Kio (qu') do (est-ce que) estas tio (c'est), la jenaĵo (que ça)?” *Aient* signifas plie „(ke) ili havu” ol „ili havus”. *Coup de chance* neniel estas „sortobato”, sed „subita fortuno”, „fortuna okazo”. Mi ne scias ĉu „frapoj obsedas francojn”, sed *coup* nur etimologie signifas „frapo” (helena κεφαλος = vangofrapo), nun ĝi estas simple „subita ago/movo”. Fine: ĉu vere „la franca estas aparte oportuna por la diplomatio pro sia (ne: ĝia) klara stilo?” Lastatempe Heinz Zerwes, direktoro de lingva servo ĉe la Eŭropa Parlamento, pridubis ĉu planlingvo taŭgus kiel politika interlingvo opiniante ke „mankas en ĝi la necesaj nuancoj kaj *malklarajoj*”. István Ertl, Nederlando

La franca netolerema?

En la prezento pri la franca (MONA-


TO, 1993/10, p. 23) mi trovis la frazon: „... la franca estas iom maltolerema al vortoj el aliaj lingvoj; multaj el la pli novaj estas apenaŭ tolerataj de konservativuloj.” Kendal ne pravas. Se pli malpli 80 % de la vortotrezoro de la franca venas el la patrina lingvo, la latina, la pruntovortoj estas tamen multaj kaj bone tolerataj. Se fakte ekzistas iu reago tio ne estas kontraŭ vortoj el aliaj lingvoj, sed kontraŭ lingva invado de unu nura lingvo, la usona-angla. Kaj tio ne estas nur afero de konservativuloj, sed de ĉiuj lingvoamantoj. Bedaŭrinde multaj homoj pensas ke por moderne paroli aŭ por montrian klarecon, oni devas nepre uzi usonajn vortojn eĉ kiam ekzistas vortoj por la samaj ideoj en la franca. Sama fenomeno certe ekzistas en aliaj kulturoj. Per filmoj, kantistoj, restoracioj kaj komercaj produktoj Usono iom post iom kulture invadis Eŭropon kaj la problemo ne plu estas ĉu la lingvo devas esti tolerema sed kiamaniere oni povas protekti sian lingvan identecon! Sen tiu necesa reago – por protektado kaj ne por malhelpi normalan riĉigon de la lingvo per fremdaj pruntoj – la franca iĝos baldaŭ dialekto kaj estos hontege paroli france. La vortotrezoro estas tio, kio permesas al la homo sin esprimi kaj tro multaj kaj senutilaj pruntoj el fremda lingvo povas tute detruji la lingvan sistemon.

Jean-Claude Thumerelle, Belgio

Aŭstralia mapo

Aperis (MONATO, 1993/10, p. 21) mapo de Aŭstralio. Ĝi estus utila, se 1. oni enmetus la Aŭstralian Ĉefurban Teritorion kaj la ĉefurbon Kanbero; 2. oni uzus la modernan nomon de la ŝtato kun la plej granda kvanto da loĝantoj, Nova Sud-Kimrio (ĉefurbo Sidnejo); 3. oni esperantigus la nomojn de la ĉefurbo de Kvinslando

(Brisbano), de Nord-Teritorio (Darvino), de Tasmanio (Hobarto); 4. oni enmetus la ĉefurbon de Sud-Aŭstralio (Adelajdo). La nomoj de la ŝtatoj kaj ĉefurboj (kelkaj aperas en PIV) estis normigitaj por registaraj eldonaĵoj (Aŭstralio, koncizaj faktoj ('74) kaj Invito el Aŭstralio ('80)) kaj aperas en la teksto de Aŭstralia-Esperanta Vortaro. Ralph Harry, Aŭstralio



La Esperanta Stelo

Leginte pri „La Esperanta Stelo” (MONATO, 1993/9, p. 13) mi trovis pliajn informojn pri la signifaro de la pentogramo, kiu simbolas sendependecon kaj solidarecon, sed kiu ankaŭ estas mafia kaj diabla simbolo. La kvinpinta stelo estas multuzata simbolo por politikaj partioj. Videbla sur standardoj, aviadiloj aŭ sur diversaj komercaj produktoj aŭ hoteloj, ĝi atestas pri la kvalito. En komunistaj landoj ĝi estas la simbolo de la unueco de la homoj en la kvin kontinentoj. En Usono ĝi estas simbolo de la Demokratia Partio. Kombinata kun duona luno, estante post la kruco la plej mondfama simbolo, tiu ĉi stelo estas rekonilo de la islama kulturo. Ĉu vere ni bezonas tian multinterpreteblan simbolon por bildigi nian internacian kulturan identecon? Eble estas interesa demando plupensinda!

Herman Deceuninck, Belgio

BULGARIO

Malsatstrika somero

La politika situacio en Bulgario rapide ŝanĝiĝis. Unu el la plej konataj deputitoj, membro de la Unuiĝo de la demokrataj fortoj (UDF), Edvin Sugarev, sendis longan leteron al la prezidanto, Jelju Ĵelev, en kiu li akuzas la prezidanton, ke tiu kunlaboras kun la socialista partio kaj bremsas la demokratajn ŝanĝojn en la lando.

Sugarev komencis strike malsati kaj postulis la abdikon de la prezidanto. Ĵelev tamen deklaris, ke li ne abdikos. La politika situacio en la lando tuj kriziĝis, ĉar multaj civitanoj apogis la strikon de Sugarev. Antaŭ la prezidantejo aperis tendoj, kies nombro rapide kreskis ĝis pli ol sepdek.

La situacio iĝis pli kaj pli streĉa. La deputitoj de UDF deklaris, ke ili ne partoprenos en la laboro de la parlamento. Multaj provis konvinki Sugarev, ke li rezignu sed li estis necedema. Li pretis morti. Tamen tute neatendite abdikis la vicprezidanto de Bulgario, la poetino Blaga Dimitrova. Ŝi deklaris, ke ŝi ne plu povas kunlabori kun la prezidanto.

Sugarev post dudektaga malsat-striko rezignis. La tendaro ĉirkaŭ la parlamentejo malaperis, tamen la kriza politika situacio daŭras.

La deputitoj de UDF sporade partoprenas en la laboro de la parlamento. Tio signifas, ke ili kunsidas nur kiam

oni pritraktas leĝojn, kiuj minacas restarigi komunismon en la lando.

Multaj politikistoj deklaris, ke baldaŭ devas esti novaj balotoj, sed ne ĉiuj samopinias pri la dato. Laŭ la plimulto de partioj la balotoj ne povas nun okazi, ĉar kaj partioj kaj balotontoj ne estas pretaj.

Unu el la plej grandaj koaliciaj partioj, UDF, kiu pasintjare gajnis la balotojn, sed rapide perdis la potencon kaj la registaron, opinias, ke la balotoj devas esti en novembro kaj eĉ fiksas la daton.

Tamen multaj UDF-anoj kredas, ke la demokratia koalicio pro senreviĝo ne gajnos la balotojn. La demokratiaj procezoj en la lando stagnas kaj la ekonomia krizo daŭre kreskas. La procento de senlaboruloj estas tre granda kaj ĉiutage Bulgario perdas milionojn da dolaroj pro la milito en Bosnio kaj Hercegovino kaj pro la severa embargo. Nun tre rapide oni fondas novajn partiojn kaj tio montras, ke la bulgaraj politikistoj febre sin preparas por novaj, pli viglaj politikaj bataloj. Momente la registaro ne reprezentas politikan forton kaj pro tio multaj opinias, ke ĝi ne havos longan vivon.

Evidente balotoj sekvos, sed kiam ili estos kaj kien iras Bulgario ankoraŭ neniu povas antaŭvidi. Gemo



Edvin Sugarev malsatstrikas antaŭ la bulgara prezidantejo. La teksto sur la afiŝeto estas vortludo. Ĝi signifas samtempe: „Unu vivo kontraŭ la mensogo” kaj „La vivo de Edvin kontraŭ la mensogo”.

Foto: Takuina Ovanesova

POLICO

Saltego trans tradicioj

Vidiĝis en Britio en la lastaj jaroj spektaklo de polico batalanta kontraŭ manifestaciantaj sindikatoj, ĉefe ministoj: pli malpli tradicia, konservativa polico vole nevole estis devigita tiel apogi politikon de brita konservativa registaro.

Ironie, ke nun la polico mem kontraŭstaras registaran politikon, ĉi-foje pro reformoj subfosontaj – laŭ estroj de polica asocio – laborkondiĉojn, salajrojn, kaj tutlandan organizon de la polica servo.

Lastatempe manifestaciis kontraŭ la registaro 23 000 policanoj en Londono: similaj, pli malgrandaj manifestacioj okazis en aliaj urboj.

Leviĝas demandoj: se policanoj kiel sindikatoj reagis, kiam minacata la vivmaniero, ĉu estontece ili pretos batali kontraŭ sindikataj „fratoj”? Aŭ ĉu ili rompos tradiciojn kaj interfratiĝos kun la sindikata „malamiko” de antaŭ nur kelkaj jaroj?

Roselyne EDWARDS

EŬROPO

Politika ĉantaĝo

Aŭ ĉe viaj flug- kaj aliaj havenoj nul-iĝos pasport-kontroloj, aŭ kun vi internacia polica kunlaboro restos nura ĥimero – jen ĉantaĝo-mesaĝo de la Eŭropa Komunumo (EK) al Britio.

Dum longa tempo la brita registaro rifuzas aliĝi al t.n. grupo Schengen [Ŝengen] konsistanta el 9 integriĝemaj EK-landoj, kies popoloj povos libere, senpasporte, transmoviĝi de unu lando al la alia. Tamen tia libereco profitigos ne nur honestulojn sed ankaŭ krimulojn. Por bridi ĉi-lastajn la Schengen-anoj starigis transnacion polican inform-servon por ebligi al ĉiu grupano tuj kaj senpere eniri naciajn prikrimulajn datenarojn.

Britoj konstante argumentis, ke necesas naciaj pasport-kontroloj precize por sin defendi kontraŭ internaciaj krimuloj. Tamen landlimaj pasport-kontroloj malkongruas kun burĝonanta eŭropa sento: pro tio la kontraŭ-brita kolero de la EK.

Plej verŝajne la brita registaro cedos al komunuma ĉantaĝo – kaj al la postuloj mem de britoj pli kaj pli konsciaj pri kreskanta enlanda krim-kvoto.

Paŭlo GUBBINS

Saluton el Absurdistano

Mi elkore salutas vin el Sarajevo, Bosnio, pri kies malfeliĉo vi certe aŭdas ĉiun tagon. Mi skribas al vi, esperante, ke vi povos helpi al mi, kvankam mi scias, ke mi estas tro libera por peti tion de vi. Mi estas 22jara studentino pri elektroniko (telekomunikado) kaj, se la milito ne malfeliĉigus mian landon, mi fariĝus inĝeniero venontjare. Antaŭ ol daŭrigi mian leteron, mi menciuj al vi, ke mi trovis vian adreson en jarlibro de 1991, ĉar pro la blokado de Sarajevo, mi ne povis ricevi novan. Tial mi eble ne rajtus uzi la delegitan reton, sed malgraŭ tio, mi petas vin, ke vi legu mian leteron kaj respondu al mi.

Mia demando koncernas universitatajn aferojn pri kiuj vi certe povos doni al mi precizajn informojn. Mi certe ne povos daŭrigi mian studadon en Sarajevo ĉar la elektronika fakultato estas detruita, do preskaŭ ne plu ekzistas. Aliflanke la urbo estas tre ruinigita, sen akvo, sen elektra kurento. La loĝantoj vivas en difektitaj domoj en teruraj kondiĉoj. La tuta situacio ne plu estas eltenbla. Mi neniam havos la eblecon fini mian universitaton aŭ normale vivi. Tial mi volus forlasi mian naskiĝurbon kaj la landon, kiuj malaperas, kaj eble daŭrigi mian studadon aŭ komenci denove en Francio, kvankam mi supozas, ke rifuĝintoj ne estos bonvenaj. Min interesas ĉio pri la universitato en Grenoble (ĉu ekzistas elektronika fakultato), kiuj estas la kondiĉoj por eniri la universitaton, ĉu mi povus daŭrigi la studadon ĉar jam studis 3 jarojn aŭ mi devos komenci de komenco, kiom kostas enskribiĝo en la universitato kaj ĉu mi povus ricevi stipendion, ĉar miaj pagkapabloj estas limigitaj...

Tiun leteron trovis en sia leterkesto emerita profesoro Marcel Cornavins en Grenoble, Francio.

La ronda manskribo de Alma havis la daton: 22an de marto 1993. Marcel Cornavin klopodis pri la informoj sed sukcesis nenion fari pri la stipendio. Li sciigis al Zagreb, kaj petis iel kontakti Alman kaj informi pri la rezultoj de la esploro.

En septembro, la tuta materialo pri la eblecoj de studo en Grenoble alvenis al Zagreb, al peranto Spomenka Štimec. Nun tie ĝi haltis – ĉar ak-



Absurdistano, parto de nia mondo, parto de via mondo.

tuale denove ne eblas sendi leterojn al Sarajevo, kaj des malpli tutajn dosierojn da materialoj. Ambasadego de Bosnio kaj Hercegovino ne akceptis la peton pri la dokumentojn ĝis Alma. Internacia Ruĝa Kruco akceptas nur etajn mesaĝojn sur kelklingvaj formularoj.

Alma estas tre entreprenema: ŝi sukcesis kontakti Zagrebon por aŭdi, ĉu io nova por ŝi pri la studeblecoj. „Kontakti” estas komplika vorto: telefonis al mi en Zagreb iu vira voĉo, radioamatoro, kiu diris, ke li „havas Alma el Sarajevo je sia linio”. Mi aŭdis en la fono la voĉon de Alma. Ĝi estis nekomprenbla.

Ĉu vi komprenis? – demandis la radioamatoro.

Ne. – konfesis mi.

Kaj li pacience frazon post frazo ripetis, kion Alma volis diri. Kaj li same pacience kaj ĝuste ripetis ĉiun mian vorton. Mi devis diri al li, ke ĝis tiu tago la materialoj ne alvenis.

Alma diktis siavice iun faksonumeron per kiu oni povas kontakti ŝin, per satelito. Ŝi devis ripeti siajn ciferojn tri fojojn, ĉar ĝi daŭre perdiĝis en la aero. 871 1121230 aŭ 871 1440327 por Alma.

Alma Krvavac, Livanjska 40, 71000 Sarajevo.

Mi esperas, ke mi sukcesos peri al ŝi la materialojn el kiuj ŝi vidas la kondiĉojn pri studado... kaj komprenos, ke ŝi malfruis, eĉ se ŝi havus monon kaj la eblecon eliri el Sarajevo.

Mi dividas kun la legantoj de MONATO tiun informon pri la ekzisto de Alma kaj pri la mondo en kiu ŝi vivas. Ĝi estas la sama kiel la nia. Kiel la via mondo.

Spomenka ŠTIMEC

RUMANIO

Sindikato-kunfandiĝo

Kreiĝis en Rumanio sindikata centralego, nomita Nacia Konfederacio de Liberaj Sindikatoj en Rumanio „La Frateco”. Ĝi naskiĝis per kunfandiĝo de tri sindikataj konfederacioj. Ĝi enhavas proksimume 3,7 milionojn da sindikatanoj. Ĝin estras du prezidantoj kaj kvar vicprezidantoj. Al la demando, ĉu NKLSR-„La Frateco” iĝos sama kiel la pola „Solidareco”, ili respondis, ke tio estus frenezaĵo. Ĝiaj celoj estas fortigo de la sindikato kiel institucio de demokratio, protekto kaj antaŭenigo de la lando, lukto kontraŭ komunismo kaj finfine transiro al merkato-ekonomio.

Gheorghe SALAHURA

Pri herooj kaj ne-herooj

Post la revolucio en 1989 en Rumanio aperis leĝo cele al rekompenco por tiuj kiuj luktis en ĝi. Estiĝis parlamenta grupo, kiu donas atestilojn, ne nur al luktintoj sed ankaŭ al neluktintoj. Inter ĉi-lastaj troviĝas multaj potenculoj. Posedas atestilojn policanoj, funkciuloj de la rumana registaro, urbestroj kaj funkciuloj en urbestroj kaj parlamento. La plej grava kazo koncernas la filon de Lulia Leo Miza, estrino de la parlamenta grupo kiu subskribas la atestilojn. Ŝi deklaris, ke ŝia filo luktis en norda urbo en Rumanio, sed tie oni entute ne batalis...

Gheorghe SALAHURA

Aŭdiĝas komuna voĉo

La kuba prezidanto Fidel Castro kunportis al la tria pintkunsido de ŝtatestroj okazinta en Salvador de Bahía, Brazilo, firman mesaĝon: Kial Sud-Ameriko ne rolas pli aktive en Unuiĝintaj Nacioj (UN)?

Kvankam la fina deklaro de la kunsido ne respondas la demandon, evidentiĝis, ke multaj sektoroj en tiu mondregiono pli kaj pli demandas la samon.

Dum la lastaj jaroj la Sekureca Konsilio de UN kun Usono ĉekape diktas la sekvendan aglinion de tiu internacia organo, eĉ pri aferoj ne preskribitaj en la ĉarto de UN por la Sekureca Konsilio.

La faktoj demonstras, ke la mondon regas la grandaj potencoj, kiuj ĉiam pli emas rezolucii per porfermitaj kontaktoj kaj eĉ ne adekvate informas pri sia agado. Pri tio la ĝenerala asembleo de UN restas kiel unu plia spektanto neniopova. Siaflanke, Sud-Ameriko restas for, malgraŭ tio, ke ĝi havas 400 milionojn da loĝantoj. Ĝi ne posedas eĉ unu konstantan reprezentanton en la Sekureca Konsilio. La nunaj tempoj postulas ŝanĝojn. Se vere oni alstrebas pli justan mondordon, antaŭkondiĉo nepre estas transformi la nunan strukturon de UN. Sud-Ameriko kiel parto de la tria mondo ne plu restu margene. Same validas por Afriko.

Se ne eblas multon ŝanĝi pro evidentaj motivoj kaj plej diversaj intereso, almenaŭ oni konsideru la rajton de la malriĉaj mondregionoj havi reprezentanton en organo, kiu decidas gravajn problemojn de la nuna vivo.

Jen mesaĝo portita de Kubo al Brazilo okaze de la ŝtatestra renkontiĝo. Cetere, la fina deklaro tie naskiĝinta estas pozitiva signo de sud-amerika sento komuna, malgraŭ la diferencoj.

Maritza GUTIÉRREZ

KUBO

Epokofaraj decidoj

Mondkonate estas, ke la nuna ekonomia situacio en Kubo malfacilas. Malgraŭ la klopodoj de la registaro trovi eliron, la ĉefaj kialoj restas: disfalo de la socialisma bloko en Eŭropo kaj la malintegriĝo de Sovetio, kune kun la jam pli ol tridek jarojn longa usona blokado. Plue, la manko de konverteblaj valutoj kreas seriozan stagnadon de la kuba ekonomio, kies efikoj sur la vivo de la popolo sentiĝas pli kaj pli dum la lastaj monatoj.

Manko de nafto, medikamentoj, nutraro, krudaĵoj kaj pluraj aliaj necesaroj, al kio aldoniĝas gravaj problemoj rilate la funkcion de plej diversaj servoj (publika transporto, elektro,


Castro: „Ĉiu kubano rajtas posedi dolarojn.”

gaso), minacas detruo la enlandan vivon.

Tial, en julio, la ŝtatestro Fidel Castro [Kastro], dum fest-parolado memore al la en 1953 ekinta batalo kontraŭ eksdiktatoro Batista, anoncis diversajn projektojn: per fremda kapitalo stimuli enlandan investadon, faciligi la vojaĝadon de eksterlandaj kubanoj al la insulo, kaj liberaligi cirkuladon kaj posedadon de konverteblaj valutoj flanke de kubaj civitanoj.

Dum iom pli ol tri jardekoj enlandaj kubanoj ne rajtis posedi konverteblajn valutojn, kio instigis al kelkaj sin dediĉi al kontraŭleĝa, kaj severe punita, valuto-kontrabandado.

Ĉio nun ŝanĝiĝos. Ĉiu kubano rajtos ricevi kaj porti ne nur dolarojn sed an-



kaŭ pundojn, markojn, lirojn. Tamen – kiel agnoskis Castro en sia parolado – tio ĉi nepre kondukos al neegaleco, ĉar ne ĉiu kubano havas eksterlandan familianon preta sendi tian monhelpon. Aliflanke Kubo bezonas valutojn por pluvoji kaj defendi ĉion atingitan dum 34 jaroj de revolucio. Inter plena disfalo de Kubo kaj estiĝo de kelkaj privilegioj, estontece forigotaj, vere ne estis elekto.

Nur eblas esperi, ke ĉiuj ĝisnunaj atingoj de la tiom akre kritikata Socialisma Revolucio en Kubo, kiu liveris belajn ekzemplojn al la tuta mondo rilate edukadon, publikan sanon, kulturon, sporton, ktp., ne pereos pro decidoj, kiujn ne ĉiuj kubanoj volonte akceptis – kvankam ĉiuj perfekte komprenas ties neceson.

Juan Lázaro Besada TOLEDO



LA MONDO EN OKTOBRO 1993

Eksa Sovetio

3a. Kunbatalantoj de Gamsafurdia, kartvela prezidinto, konkeras la urbojn Poti kaj Fioni. 20 000 homoj fuĝas.

3a. Ekskomunisto Alijev elektiĝas prezidanto de Azerbajĝano.

22a. Registraraj trupoj de la kartvela prezidanto Ŝevardnadze rekonkeras la urbojn okupatajn de la anoj de Gamsafurdia.

27a. Kievo rifuzas la tujan detruon de siaj nukleaj armiloj kaj atendas financan apogon de la okcidento.

Eksa Jugoslavio

4a. La sekureca konsilio de UN longigas la mandaton de la UN-trupoj en eksa Jugoslavio per ses monatoj.

6a. La beograda prokuroro rezignas pri tribunalakuzo kontraŭ Draškoviĉ, serba opozicia gvidanto, kiu antaŭ nelonge estis arestita kaj poste liberigita.

7a. Izetbegoviĉ, bosnia prezidanto, rekonfirmas sian rifuzon de la UN-plano pri la teritoria disdivido de Bosnio-Hercegovino.

29a. En Sarajevo formiĝas nova bosnia registaro. La rilatoj inter Serbio kaj Montenegro pliakriĝas.

Okcidenta Azio

2a. Ŝejko Tarif, estro de la druzoj, mortas 95jara.

5a. Mubarak balote konfirmiĝas kiel egipta prezidanto.

6a. Arafat, palestina estro, Rabin, israela ĉefministro, kaj Mubarak pintrenkontiĝas en Kairo.

21a. Mitterrand, franca prezidanto, oficiale akceptas la ĉefon de PLO, Arafat.

25a. Kadre de ĝenerala amnestio, Israelo liberigas unuan parton de palestinaj karceruloj.

27a. Irano lanĉas novan bombatakon kontraŭ norda Irako, kie vivas kurdoj.

Azio

2a. Post okmonata interrompo, ambaŭ koreaj ŝtatoj daŭrigas sian dialogon.

7a. Malgraŭ internaciaj protestoj, Ĉinio realigas subteran nuklearmilan teston. Usono intencas daŭrigi la proprajn eksperimentojn.

7a. La parlamentajn elektojn en Pakistano gajnas la partio de Benazir Butto.

Afriko

8a. La ĝenerala kunveno de UN nuligas la sankciojn kontraŭ Sud-Afriko.

15a. De Klerk, sud-afrika prezidanto, kaj Mandela, estro de la Afrika Nacia Kongreso, komune ricevas la Nobel-pacpremion.

16a. Francio ebligas al Mobutu, zairia diktatoro, diplomatan rehonorigon per lia partopreno en la internacia konferenco de la franclingvaj landoj en Maŭricio.

21a. Politika renverso en Burundio forpuŝas la unuan demokratie elektitan prezidanton Ndadaye.

Ameriko

7a. Morrison, nigra usona verkisto, ricevas la Nobel-premion por literaturo.

13a. La sekureca konsilio de UN reenkondukas la embargon kontraŭ Haitio, pro la malhelpoj de ĝia estraro revenigi ekzil-prezidanton Aristide.

20a. Noriega, prezidinto de Panamo, estas kondamnita en Usono je 20jara mallibereja puno.

21a. Robaina, kuba ministro pri eksteraj aferoj, proponas dialogi kun siaj samlandanoj vivantaj en ekzilo.

25a. En la parlamentaj elektoj en Kanado, la liberaluloj venkas la ĝis nun regantajn konservemulojn. La nova ĉefministro nomiĝas Chrétien.

Eŭropo

4a. Rumanio iĝas la 32a membro de Eŭropa Konsilio.

5a. Papo Johano Paŭlo 2a publikigas novan enciklikon (*Veritatis splendor*), kiu konfirmas la konserveman moraldogmaron de la vatikana eklezio.

10a. La parlamentajn elektojn de Grekio venkas la socialista partio Pasok kun sia estro Papandreu.

11a. La turka sekureca polico arestas konatajn intelektulojn, kiuj kuraĝis esprimi sian vidpunkton pri la kurda demando.

12a. Kiel lasta, Germanio aliĝas al la kontrakto de Maastricht.

18a. La pola registaro sub Soc-hocka demisias. La nova ĉefministro nomiĝas Pawlak.

31a. Fellini, signifa itala filmreĝisoro, mortas 73jara.

Andy KÜNZLI

RUMANIO

Denove mortpuno

Post pli ol tri sen-mortpunaj jaroj en Rumanio, la mortpuno denove validas. Ĝi malaperis en decembro 1989, kiam mortpuniĝis geedzoj Ceausescu [Ĉeaŭŝesku]. La mortpuno malaperis tute el Rumanio, pro subskribo de Rumanio al Eŭropa Konvencio por Homaj Rajtoj, kaj al la protokolo n-ro 2 de Internacia Pakto pri Politikaj kaj Civilaj Rajtoj. Tamen pro enkonduko de la mortpuno, oni esperas iom ĉesigi la altan malobeemon en rumana socio. Estis multaj paroladoj, kaj por kaj kontraŭ mortpuno. Oni diris, ke la reapero de mortpuno en Rumanio signifus regreson. Same, ke tiu puno estas barbara. Sed kiel oni povus malaperigi malbonon, se ĝi ne estas ekstermita de radiko? Nuntaga Rumanio nepre bezonas mortpunon.

Inter 1965 kaj 1987 estis mortpunitaj en Rumanio 104 personoj. Ĉiuj estis kondamnitaj pro krimoj, inkl. de saboto de nacia ekonomio kaj fraŭdo. Gheorge SALAHURA

ZAIRIO

Totalismo kaj magio

Malgraŭ diversaj ŝanĝoj en la mondo, i.a. perestrojko, kiuj forblovis multajn diktatorojn, en Zairo prezidanto Mobutu daŭre ŝtatestras – apogita kaj de magio kaj de sekreta asocio. Konate estas, ke politikistoj en nedemokratiaj landoj sian volon aŭ sistemon trudas pere de milita forto aŭ simple de karaktero aŭ, por afrikanoj, pere de magio – kaj, por pravigi la totalismon de Mobutu, multaj zairanoj kredas, ke la prezidanto disponas magiajn povojn, kiun li akiris en Hindio.

Pli insida tamen estas la ekzisto de sekreta asocio fondita en 1985 por

rezisti al ĉiu paŝo cele al demokratiigo de la lando. La asocio, nomita *Prima Curia*, kreiĝis de membroj de politika partio Popola Movado de la Revolucio (PMR) por certigi ties estontecon – eĉ preze de sango kaj de oferoj homaj.

Ĉiu dronas

Sendube PMR kaj la *Prima Curia* respondecas pri malapero de zairanoj, kiuj kuraĝis esprimi opinion kontraŭ tiu de la partio. La ekzisto de la asocio klarigas, kial Mobutu, anoncinte en aprilo 1990 projekton pri eventuala demokratiigo, intertempe nenion faris: dum tri jaroj da demokratioserĉado ĉiu dronas en la lando de Mobutu – regas konfuzo, anarkio, malordo, tribalismo, mortigo, malsato kaj malsano. Pro tio Mobutu povon ne cedos al aliulo, kies eble demokratiaj principoj kolizios kun tiuj de *Prima Curia*, por kiu libereco kaj demokratio simple ne ekzistas.

Zandandu Ntomono ZOLA

BRITIO

Kiu estas la prezo de sano?

La brita nacia sanservo iam estis fierinda. Alilandanoj ofte volis veni al Britio por specialista aŭ malfacila kuracado. Tamen ne plu tiel estas. La nivelo de ĉi tiu plej grava servo suferis pro registaroj kaj mondirektistoj – precipe dum la nuna jardeko de la konservativa registaro, kiu deklaris dum elektokampanjo „La sanservo estas sekura en niaj manoj”.

Nun por ordinaraĵoj oni devas longe atendi en listo de nomoj monatojn, eĉ jarojn longa. Eĉ la kvalito de la kuracado kaj operaciado ne estas plu fidinda.

La servo estas elimposte pagata de la ŝtato. Ĉiu ajn rajtas al senpaga trakto de kiu ajn malsano, nekonsidere pri statuso kaj monhavo. Sed la kvanto de servo, kaj la malfacileco atingi tiun servon obstaklas grandparte resaniĝon de multaj pacientoj.

Por ŝpari monon la registaro fermas zorgoĉambrojn en grandaj hospitaloj, eĉ kompletajn malsanulejojn, kaj malgrandigas la nombron da litoj en la restantaj. Tial la estroj rifuzas akcepti pacientojn kaj sendas aliajn hejmen pli frue ol saĝo diktus.

Dentokuraco same kolapsas. La honorarioj pagataj al lokaj dentistoj kaj limigo de rajtoj kreas rapidemon kaj nesufiĉan atenton al bezonoj de la pacientoj. Mono regas. Oni devas uzi la plej malmultekostajn materialojn. Maljunulojn ofte oni forŝovas.

Jen ekzemplo: Viro petis helpon pro dentodoloro. La kuracisto diagnozis karion kaj rekomendis ke li eltiru ĉiun denton. Falsa dentaro promesus plenan liberiĝon de ĉia malkomforto. Li ne diris, ke tio estus por li pli facila kaj pli enspeza. La viro konsentis. Post tri nekontentigaj provoj, dum ses malfeliĉaj monatoj, la kuracisto sendis lin al hospitalo en Londono. Tie tamen la specialistoj estis plene okupitaj kaj donis la taskon al juna studentino. Dufoje ŝi provis, dufoje ŝi fiaskis. Al alia studentino. Fiasko denove. Nun la maljunulo sekvas malmolan dieton. Sen dentaro.

Mankas rimedoj


La kapitalisma registaro de Britio volas, ke ĉio, eĉ medicino, dependu de komercaj leĝoj. Ĝi donas al ĉiu urba hospitalo, kaj al ĉiu kuracisto,

fiksitan monsumon nur arbitre difinitan, kaj postulas raporton pri ties elspezo. Se la hospitalo tro elspezas, oni punas; se oni ne uzas la tutan buĝeton, oni reduktas ĝin por la posta jaro. Administrantoj kaj kaskistoj iĝis pli eminentaj ol la ĥirurgoj mem. La flegistoj foje devas doni al paciento malmultekostan kuracilon, sciante, ke pli efika sed pli kosta rimedo kuŝas en la ŝranko!

Kuracistoj ofte petas pardonon de la pacientoj asertante, ke ne ĉe ili kuŝas la kulpo. Mankas rimedoj. Tiuj homoj praktikantaj en kondiĉoj kiuj tordas iliajn korojn estas egale malfeliĉaj kiel la viktimoj. Kelkaj devas labori ĝis 14 horojn tage. Sentemaj flegistoj foje laboras aldonajn horojn por helpi en delikataj situacioj.

Plendoj pri la servo kaj pri longaj atendoj abundas. La nombro kreskas. Sed la respondeculoj en la registaro asertas, ke ĉio boniĝas. Ekzistas komitato, subvenciata de la ŝtato, ĉe kiu oni rajtas plendi. Sed oni ricevas prokrastajn respondojn en espero, ke la plendinto foriros: „Devas konsulti kolegojn.”, „Necesas ekzameni la dosieron.” aŭ „Ni komitatos post unu monato.” kaj tiel ade plu.

Fondiĝis volontula asocio Agado por Viktimoj de Medicinista Mistrakto. Tiu organizaĵo estas senmona sed idealismaj advokatoj kunlaboras. Sed eĉ kun ilia helpo povas pasi



monatoj, eĉ jaroj, antaŭ ol ricevi eĉ etan kompenson.

La homoj ĉe la fronto de la sistemo, kies manoj tuŝas la malsanulojn, konstante kverelas kun la homoj kiuj sidas en oficejoj turnante paĝojn de kaslibroj.

Dume nukleaj ŝipoj kaj armiloj plimultiĝas. Dume la batalila tekniko ŝtelas miliardojn. Dume la ĥirurgoj kaj administrantoj loĝas en grandaj domoj kun grandaj aŭtoj. Almenaŭ ilin la nacia sanservo helpas bone.

Will GREEN



Mafio – pli danĝera ol la itala

Bulgarion denove inundis rusoj. Tamen ĉi-foje kiel estro de ĉiam pli fortiganta mafio. En la nigramara havenurbo Burgas krimuloj kaj aventuristoj el eksa Sovetio (inter ili ne nur rusoj) regas negocon de armiloj kaj drogaĉoj, ankaŭ prostitucion kaj okupigas pri ĉantaĝo, perforta postulado. Ili inundis ankaŭ Pollandon, Hungarion kaj aliajn landojn de la tiel nomata „eks-socialisma tendaro”, tamen en Bulgario (iom ŝerce nomita la 16an sovetian respublikon), oni povas funkcii pli facile pro simileco de lingvoj. „Rusa mafio jam grandskale agadas ĉi tie kaj laŭ informoj kiujn mi havas, ĝi estas pli danĝera ol la itala”, deklaris ĝenerala prokuroro de Bulgario, Ivar Tatarĉev.

Laŭ informo de la brita *Financial Times* (Financaj Tempoj) oni vendas armilojn sufiĉe malmultekoste: Kalaŝnikov-mitrilo kostas nur 8000 levojn (320 usonajn dolarojn). Same, oni ne unufoje proponis al doganistoj koruptaĵon ĝis 20 000 dolaroj por ebleco senhalte traveturigi ŝarĝojn tra la bulgaraj limoj. Finprofitistoj el eksa Sovetio ankaŭ regas centojn da putinoj kaj dancistinoj en incit-nudiĝejoj. Nun eĉ en la plej malgrandaj bulgaraj urbetoj estas incit-nudiĝistinoj el diversaj partoj de eksa Sovetio.

La profesio de la „mafiistoj” estas sufiĉe profitdona. Laŭ informo de unu el ili, li ĉiutage havas profiton de ĉ. 50 000 levoj (2000 usonaj dolaroj).

NikSt

RUSIO

Sabotanto en la centralo?

Baldaŭ post la 1991a puĉo en Moskvo estis arestita Oleg Savĉjuk, programisto ĉe Ingalina atoma elektrocentralo. Kaŭzo de la aresto ne estas ordinara. Savĉjuk estis akuzita, ke li preparis kaj ekuzis dum sia laboro parazitan programan modulon, kiu i.a. damaĝis kalkuladan sistemon „Titano”.

Gravas la rolo de „Titano” en regado kaj sekura funkcio de la centralo. La sistemo konsistas el 760 unuoj da reciproke ne kunligita malsimpla aparataro kaj 25 elektronikaj kalkuliloj. Ili akceptas, prilaboras kaj liveras ĉ. 30 mil signalojn el reaktoro, turbinoj kaj

generatoro. „Titano” estas la centralo-cerbo kaj facile imageblas la konsekvencoj rezultantaj el perturbiĝoj en la sistemo.

Savĉjuk ĉiujn akuzojn refutis, kaj nur juĝproceso montros, ĉu kulpas la programisto. Tamen ekzistas duboj pri la kulpo de la akuzito, ĉar post la puĉo oficistoj de la centralo serĉis „malamikojn de la nacioj”... kaj la „dektivoj” grandajn monpremiojn ricevis.

Nuntempe 33-jaraĝa altkvalifikita specialisto (tiel lin karakterizis multaj kunlaborantoj) studas sian dosieron kaj atendas juĝon.

Antanas KRENCEVIČIUS

IRLANDO

Ĉu nova Bizantio en Irlando?

MONATO plurfoje komentis, ke Irlando estas paradoksa kaj originala lando. Unuavide, la tiea ĉiutaga vivo aspektas preskaŭ nedistingebla de tiu en Anglio, sed iom post iom konstatiĝas, ke kelkaj trajtoj estas unikaj, kaj kelkfoje bizaraj.

Ĉi-jare estis anoncite, ke oni baldaŭ

komencos en Stradbally, malgranda vilaĝo en graflando Laois [Liŝ] la unuan ortodoksian (grekritan) preĝejon en la Irlanda Respubliko.


Bizaraj konstatoj

En tiu fora kaj malgrava vilaĝeto loĝas nek grekoj nek slavoj, sed nur (kiel ĉie en Suda Irlando) katolika plimulto kaj eta protestanta malplimulto. Ne estis klarigita la demando: El kie venos do ortodoksiaj adorantoj por plenigi la novan preĝejon? Apenaŭ estus kredeble, ke Stradbally atendas amasan enmigradon el orienta Eŭropo.

Plia bizara konstato: Antaŭ nelonge okazis en la sama vilaĝo kunveno de la frakcio en la irland-anglikana konfesio, kiu kontraŭstaras la akcepton de inaj pastroj. En Anglio, pluraj tiaj „kontraŭ-pastrinuloj” intencas aliĝi al la romkatolika eklezio, sed simila decido estus preskaŭ neimagebla en Irlando. Ĉu la estonta ortodoksia kongregacio devenos de tiu rondo?

En tiu kazo, la mistero restas: kial fondi ĝin en tiel malverŝajna loko? Eble la respondeculoj volas imiti la organizintojn de la Eŭrovizio-kantkonkurso, kiuj simile elektis por sia evento nekonatan vilaĝon en distanca land-interno.

GMA



La baza principo de aŭtomobilo de invento ĝis hodiaŭ praktike ne ŝanĝiĝis: motoro funkcianta per benzino. Sed la poluado devigas trovi novajn principojn; unu el ili estas elektra motoro. Kompanio Siemens nun pruvis, ke ĝia elektra motoro povas peli eĉ aŭton de formulo 1 ĝis rapido de 170 km/h. La motoro, kiun Siemens ofertas en seria produktado ekde 1994, funkcias dum 5000 horoj sen interveno, kio sufiĉos ĉe meza rapido de 50 km/h por 250000 kilometroj. Krome la motoro eltenas temperaturojn de -40 ĝis +70 Celcius gradoj.

Ankaŭ maljunuloj havas rajtojn

En pasintaj jaroj oni rekonis, ke maljunuloj rajtas specialan prizorgon de la socio. La aŭstralia registaro proklamis ĉarton de rajtoj kaj respondecoj de la loĝantoj en fleghejmoj, t.e. en hospitaloj por maljunuloj.

Ĉiu havas la rajton al libereco, respekto kaj al justa traktado fare de aliaj. La rajtoj de persono ne malgrandiĝas kiam ŝi aŭ li transloĝiĝas al fleghejmo, sendepende de ŝia aŭ lia fizika aŭ mensa malforteco aŭ kapablo praktiki aŭ plene kompreni siajn rajtojn.

Pozitiva, subtena kaj tenere prizorga sinteno de familio, amikoj, la posedantoj kaj laboristoj de fleghejmoj, prizorgantoj kaj la komunumo helpas homojn, kiuj loĝas en fleghejmoj, daŭre vivi kiel respektataj kaj estimataj socianoj.

La ĉarto asertas la principojn de la socia justeco, tiel ke la personaj, civilaj, juraj kaj konsumaj rajtoj estas neniel malgrandigitaj pro transloĝiĝo al fleghejmo.

La ĉarto rekonas, ke loĝantoj en fleghejmoj havas la respondecon certigi, ke la praktikado de individuaj rajtoj ne rompas la individuajn rajtojn de aliaj, inkluzive la rajtojn de

prizorgantoj. La ĉarto rekonas, ke loĝantoj havas specifajn rajtojn kaj respondecojn, kiuj ekvilibrigas la bezonojn de la individuo en la fleghejma komunumo.

La ĉarto inkluzivas i.a. jenajn klaŭzojn: ke ĉiu fleghejmulo havas la rajton

- al bonkvalita prizorgo, taŭga al la bezonoj
- al plena informado pri sia sanstato kaj pri haveblaj kuracadoj
- esti traktata kun digno kaj respekto, kaj vivi sen ekspluatado, misuzo aŭ neglekto
- daŭrigi siajn kulturajn kaj religiajn praktikojn kaj reteni la lingvon de sia elekto, sen diskriminacio
- elekti kaj daŭrigi sociajn kaj personajn rilatojn kun kiu ajn sen timo, kritiko aŭ limigo
- daŭrigi regadon super, kaj daŭre fari decidojn pri, la personaj aspektoj de sia ĉiutaga vivo, siaj financaj aferoj kaj siaj posedaĵoj
- esti konsultata pri, kaj doni ideojn pri, decidoj pri la loĝaranĝoj en la fleghejmo
- plendi kaj ekagi por solvi disputojn.

Samtempe fleghejmulo havas i.a. la respondecon:

- respekti la rajtojn kaj bezonojn de aliaj personoj interne de la fleghejmo, kaj respekti la bezonojn de la fleghejma komunumo kiel tutaĵo
- por sia propra sano kaj bonfarto, tiom kiom ŝi aŭ li kapablas.

Ralph HARRY

Memorsoleno en Dachau

Lastatempe grupo da gejunuloj, membroj de la Lerneja Sanitara Servo en lernejo en Augsburg, Germanio, okazigis solenon memore al la malfermiĝo de la unua koncentrejo en Dachau [Daŭaŭ]. La gejunuloj ŝanĝis sian kutiman ruĝkrucan programon kaj studis historion dum siaj kunvenoj. En la grupo estis ne nur germanoj sed ankaŭ gejunuloj el, ekzemple, Turkio, Hispanio, Vjet-Namo, Sirio... infanoj de gastlaboristoj, azilpetintoj, ks. La temo havis akran aktualecon.

Neviŝebla impresio

Unue vizitinte la muzeon de la koncentrejo sub gvido de iamaj arestitoj, ili vidis la gaskameron kaj fornojn, en kiuj oni forbruligis la kadavrojn. Poste ili aŭskultis la informojn de maljunaj postvivantoj: arestito n-ro 5170, kiu venis al Dachau, ĉar kiel membro de la Pola Ruĝa Kruco li estis helpinta la viktimojn de la nazi-invado en 1939 kaj judo, kiu perdis sian junan edzinon kaj preskaŭ la tutan familion en alia koncentrejo, Auschwitz, kaj travivis nur pro hazardo.

Sub la sono de la preĝejoj sonoriloj, la gejunuloj silente marŝis ĝis la tiama kunvokejo, kie ili deponis belegan florbukedon kaj kantis kanton kreitan en koncentrejo: „La marĉosoldatoj”. Per laŭtleĝata letero, la prezidanto de Germanio, Richard von Weizsäcker [Riĥard fon Vajtsek^or], salutis la ĉeestantojn kaj laŭdis la diversnaciajn kaj diverskulturajn gejunulojn pro ilia „necesa kaj bona paŝo” komune pritrakti la germanan historion. La prezidanto de la postvivantoj Dachauanoj aldonis, ke inter multaj solenoj, kiujn li ĉeestis, tiu ĉi estas precipe impona, ĉar ĉi-foje junaj homoj ne nur memorigis pri la historiaj malhumanaj kruelaĵoj, sed ankaŭ montris sian apogon por pli da amo kaj toleremo en la mondo.

La junaj ruĝkrucanoj kaj gelernantoj mem skribis en siaj raportoj, ke la impresio de tiu tago restos neforviŝebla en ilia memoro.

Josef M. IPFELKOFER



Viajn kontribuojn por la rubriko „moderna vivo” sendu al:
Paul Gubbins
3 Arden Court
Mossley
Congleton, Cheshire
Britio CW12 3JH

La problemo de Fermat – solvita!

Marĝeno de libro estis tro mallarĝa por permesi al Fermat prinotian „mirindan” pruvon; tial ĝi perdiĝis. Lastatempa solvinto de la 300jara enigmo bezonis pli ol 200 paĝojn por prui sian solvon...

$$a^n + b^n = c^n$$

Kiel fulmo el serena ĉielo trafis la matematikan mondon je la fino de junio la novaĵo, ke la „granda konjekto”, kelkfoje ankaŭ nomata „la granda teoremo” aŭ „la lasta teoremo” de Fermat estas solvita. Prezenti solvon dum simpozio en Kembriĝo la matematikisto Andrew Wiles [Ŭajls]. Tiu ĉi problemo, pri kiu sciencistoj kaj laikoj cerbumis vane jam pli ol 300 jarojn, en eksterordinara maniero ekscitis la atenton de lernantoj kaj instruistoj, de studentoj kaj elstaraj fakuloj – ne nur pro la interesa demando, sed ankaŭ, kaj ofte ĉefe, pro la premioj, kiujn proponas aŭ proponis kelkaj institucioj. Ofte jam iu pensis, ke li estis solvinta la problemon – kaj poste li aŭ alia persono trovis eraron en la rezonado. Sed nun spertuloj asertas, ke la prezentita pruvo estas fidinda, kvankam certe la kolegoj de Wiles bezonas ankoraŭ iom da tempo por trastudi ĉiujn detalojn de la pruvo.

Pri kiu problemo temas? Jam la antikvaj egiptoj konis la fakton, ke per tri ŝnuroj, kies longoj estas en la rilatumo 3 : 4 : 5, oni povas konstrui ortan triangulon. La teoremo de Pitagoro ja asertas, ke triangulo posedas orton, se por la longoj de ĝiaj lateroj a , b kaj c validas $a^2 + b^2 = c^2$, t.e. la sumo de la kvadratoj de la katetoj egalas al la kvadrato de la hipotenuzo; la triopo $a = 3$, $b = 4$, $c = 5$ estas la plej simpla, kiu kaj plenumas tiun postulon kaj konsistas el naturaj nombroj. Ekzistas senfinia kvanto da tiaj triopoj; aliaj (kiujn oni ne simple per simultana multipliko ricevas) ekzemple estas $a = 5$, $b = 12$, $c = 13$ aŭ $a = 8$, $b = 15$, $c = 17$, ktp. Tion jam sciis la antikvaj babilonianoj, kaj oni supozas, ke multo, kion oni tiurilate ofte asignas al la grekoj, estis eltrovita mil jarojn pli frue ĉe la bordoj de Eŭfrato kaj Tigriso. (Ekzemple sur argila tabuleto el tiu epoko oni trovas la informon, ke $4961^2 + 6480^2 = 8161^2$, malfacile per simplaj provoj havebla ekvacio.) Pierre de Fermat (1601-1655) estis juristo kaj reĝa konsilisto en Tuluzo. Li parolis la plej gravajn eŭropajn lin-

gvojn kaj verkis poemojn en la franca, latina kaj hispana lingvoj. Tio ne malhelpis, ke li siatempe estis unu el la gvidaj kapoj sur la kampo de la matematiko. Li laboris ekzemple pri la analiza geometrio (apud Descartes), tanĝantoj, kvadratoj, maksimumoj, kaj hodiaŭ oni lin konsideras ĉefe kiel unuan modernan esploriston de la nombroteorio. Proksimume en la jaro 1637 li legis pri la supre menciita problemaro en la libro *Arithmetica* (Aritmetiko) de Diofanto (250 p.K.) aperinta en latina traduko kelkajn jarojn antaŭe. Li iel rimarkis, ke la dua potenco por tiaj egalaĵoj estas escepto. Sur la marĝenon de sia ekzemplero de la diofanta libro li notis: „Aliflanke ne eblas skribi nombron, kiu estas kubo, kiel sumon de du kuboj; aŭ kvaran potencon skribi kiel sumon de du kvaraj potencoj; aŭ ĝenerale iun nombron, kiu estas potenco pli alta ol la dua, kiel sumon de du samaj potencoj. Mi havas vere mirindan pruvon por tiu fakto, sed la marĝeno estas tro mallarĝa por noti ĝin.” Aŭ per modernaj formuloj: la ekvacio $a^n + b^n = c^n$ ne posedas solvon per naturaj nombroj a , b , c , se la (entjera) eksponento n estas ≥ 3 .

Tri jarcentoj da klopodo

Per tiu marĝena noto naskiĝis sfinkso, kiu mistifikis la posteulojn ĝis hodiaŭ. Se vere Fermat por sia aserto trovis pruvon, tiam ĝi devas esti vere „mirinda”, ĉar dum la sekvantaj pli ol tri jarcentoj la fortoj de la plej elstaraj matematikistoj ne sufiĉis por ĝin trovi. Kelkaj historiistoj simple opinias, ke Fermat eraris. Tiun opinion subtenas forte la fakto, ke Fermat per leteroj kaj manskribitaj traktaĵoj ofte kaj ripete atentigis la ceteran mondon pri siaj eltrovoj (kvankam li insiste rifuzis kutiman publikigadon de siaj rezultoj; li ankaŭ neniam aldonis pruvojn de siaj asertoj), sed la problemon sur la marĝeno en la libro li neniam menciis aliloke en la citita formo. – La ceteraj asertoj de Fermat ne plu ekscitas la mondon, ĉar ili jam de longe

estas pruvitaj (kun unu escepto, kie montriĝis, ke li eraris).

Post lia morto liaj adeptoj, timante, ke la nur en unuopaj ekzempleroj cirkulantaj verkoj de Fermat perdiĝus, eldonis la matematikan heredaĵon de li. Lia filo Samuel de Fermat sukcesis kvin jarojn post la forpaso de sia patro reeldoni la *Aritmetikon* de Diofanto kun suplemento, kiu prezentis ankaŭ la marĝenajn notojn troviĝantajn en la ekzemplero de Fermat. Tiam publikiĝis do lia aserto, kiu estis ĝis nun unu el la plej famaj matematikaj problemoj nesolvitaj, kaj kies solvon provis atingi multaj specialistoj. Ekzemple Euler (1707-1781) en la jaro 1753 skribis al Goldbach, ke li „povas prui la aserton de Fermat por la eksponento $n = 3$ ”, sed hodiaŭ oni ne klare scias, ĉu Euler konsciis pri certa detalo en sia pruvo (en la formo prezentita de li en la jaro 1770 en lia *Algebro*), kiun oni povas opinii erara. Por la eksponento 4 la metodoj troviĝantaj jam en la libro de Diofanto ebligas pruvon „sur lerneja nivelo”. Sed nur en la jaro 1825 la 70jara franco Legendre kaj la 20jara germano Dirichlet sendepende kaj preskaŭ samtempe prezentis pruvon por la eksponento $n = 5$. Poste (en 1832) Dirichlet sukcesis ankaŭ por la eksponento $n = 14$; en 1839 Lamé venkis (per ege komplikaj metodoj) la pli malfacilan kazon $n = 7$.

Tiuj ĝis nun menciitaj metodoj taŭgis nur por unuopaj eksponentoj, oni ĉiam bezonis iun novan ideon. En la jaroj 1847-1850 la germano Kummer eltrovis manieron, kiu aplikiĝis por ĉiuj eksponentoj n , kiuj estas tielnomataj „regulaj primoj”. (Oni facile vidas, ke nur necesas studi primojn kiel eksponentojn. Por la fakuloj: Ne para primo p estas laŭ la difino de Kummer *regula*, se ĝi ne divizoras en la numeratoroj de la nombroj B_2, B_4, \dots, B_{p-3} de Bernoulli.) Kummer mem rimarkis, ke ne ĉiuj primoj estas regulaj; $p = 37$ estas la plej malgranda ne regula primo. Sed liaj metodoj jam sufiĉis por ĉiuj eksponentoj ≤ 100 kun la esceptoj 37, 59,

67, 74. Liajn ideojn evoluigis la matematikistoj Mirimanoff, Wieferich, Furtwängler kaj aliaj, kaj tiel oni sukcesis pruvi la aserton de Fermat en ĉiuj kazoj, en kiuj la eksponento n ne superas 125 000. Sed neniu el tiuj pruvoj taŭgis por ĉiuj eksponentoj.

Antaŭ dek jaroj Faltings per abstraktaj kaj tre malfacilaj metodoj eltrovis, ke por difinita $n \geq 3$ maksimume finia nombro da esence malsamaj entjeraj solvoj de la ekvacio $a^n + b^n = c^n$ povas ekzisti. Tiu rezulto por laiko eventuale ŝajnas esti sensignifa. Tamen ĝi ege siatempe ekscitis la spertulojn, ĉar la unuan fojon oni povis fari konstataĵon pri ĉiuj eksponentoj n samtempe. Por sia eltrovo Faltings fariĝis kvazaŭ subite famkonata en la matematika mondo; li ricevis por sia laboro la Fields-medalon, kiu estas rigardata kiel la Nobel-premio por la matematiko.

Por nefakulo: fremda slango

Nun do kun iom da melankolio la matematikistoj devas rezigni pri fiera fanfaronado je tia facile ankaŭ al nefakuloj klarigebla problemo nesolvita. Andrew Wiles, brita matematikisto laboranta en Usono, je la 23a de junio ĉe la fino de sia prelego antaŭtagmeze en Kembriĝo, Anglio, en la instituto „Isaac Newton” asertis, ke li pruvis la konjekton de Shimura, Tanijama kaj Weil pri semistabilaj elipsaj kurboj super la racionalaj nombroj. Tiu konjekto asertas, ke ĉiu tia kurbo estas modula. Ĉar oni jam de kelkaj jaroj sciis (pro la eltrovaĵoj de Frey kaj Ribet), ke el eventuale ekzistanta entjera solvo de ekvacio $a^n + b^n = c^n$ kun $n \geq 3$ oni povus konstrui semistabilan elipsan kurbon, kiu *ne* estus modula, el tio sekvas, ke tiaj entjeraj solvoj ne povas ekzisti. Oni vidas, ke la pruvo ne estas rezulto de la laboro de unu persono. Nur ĉar jam multaj aliaj plugis kaj semis tiun kampon, tial nun oni povas rikolti tiun frukton. Kontribuis senpere al la preparado inter multaj aliaj jenaj sciencistoj: Mazur, Hida, Flach, Kolyvagin, Rubin, Tunnell krom la jam menciitaj.

La nefakula publiko nur kun miro povas gapi al la fremda slango, per kiu la modernaj matematikistoj komuniĝas; kaj vana estas ĉiu provo kompreni la sencon de iliaj hieroglifoj, kiujn ili samtempe pentras al nigra tabulo. Laŭdire la pruvo de Wiles ampleksas pli ol 200 paĝojn; ankaŭ spertaj matematikistoj, kies speciala fako ne rilatas al la modernaj algebra geometrio kaj nombroteorio, devus oferi multe da energio por kompreni ĉiujn detalojn de la

pruvo – iom seniluziiga stato de la modernaj sciencoj.

Monpremio atendas

Jam en 1816 la Franca Akademio promesis al eventuala solvanto de la problemo de Fermat oran medalon kaj 3000 frankojn. Akriĝis por la scienca mondo la situacio, kiam en la jaro 1908 Paul Wolfskehl proponis al la publiko premion de 100 000 oraj markoj por jesa solvo al la konjekto. Tiu premio siatempe estis sufiĉe alta! Ĉiuj interesitaj laiko tuj ĵetis sin al la problemo, kaj la fakuloj devis (kaj cetere ankoraŭ nun devas) peni por trovi la ofte ne facile videblajn erarojn en la torrento de plejparte sensencaj rezonadoj. Ne malhelpis, ke intertempe pro la du mondmilitoj kaj pro la inflacio tiuj cent mil markoj ŝrumpis iam al bagatela sumo; tamen ĉiumonate ankoraŭ al diversaj matematikaj institutoj en la mondo

alvenas „solvoj” de la fama konjekto. Precipe la koncerna instituto en Göttingen estas trafita de tia riverego da papero, ĉar la Akademio de Sciencoj en Göttingen administras la heredaĵon de Wolfskehl. Kvankam la statutoj de la premio klare diras, ke aljuĝo nur povas okazi, se la solvo estas publikigita en presita formo kaj se post du jaroj la pruvo estas akceptita kiel ĝusta, tamen kelkaj nekompreneblaj „solvintoj” jam minacis per pugnoj kaj tribunaloj por gajni la premion. Nun tiu stato espereble baldaŭ finiĝos. – Onidire cetere aŭdiĝas el Göttingen, ke oni tie sukcese laboris, kvankam ne pri la matematika tamen pri la mona problemo, kaj ke pro diligenta kaj ruza investo la malgranda postmilita valoro de la Wolfskehl-premio intertempe iom dikiĝis al pli ol 50 000 germanaj markoj.

Horst S. HOLDGRÜN

BOTANIKO


Plantoj scias kiel trovi la sunon

Kiel ĉiuj ja scias, por kapabli fabriki la bezonatajn ĥemiajn substancojn, la plantoj devas ricevi la sunan energion. Tial, la plejparto, sendepende de sia pozicio, povas turni la „vizaĝon” al la suno. Ili posedas „serĉosistemon” por sekvi la sunradiojn. La sunfloro havas specialan renomon ĉi-sence, ankaŭ iuj specoj de kakttoj. Kiel povas la plantoj fari ĉi tiun aferon? La usona sciencisto Fulton

Fisher [Fultn Fiŝe] opinias, ke li trovis la klarigon.

La surfoliaj ĉeloj sendas signalojn al la ĉeloj kiuj ligas la tigon. Funkcie de la senditaj informoj, la planto reagis ŝanĝante la dimensiojn de la ĉeloj. Tiel la planto memmoviĝas, do ŝanĝas sian orientiĝon. Kiam la ekvilibro restabiliĝas, la intenseco de la signaloj malpligrandiĝas kaj la planto ne plu rondiras, haltante en la plej favora pozicio. Jen do kiel simplan kaj efikan orientilon konstruis la naturo.

Marian Constantin GHILEA



BELGIO/ZAIRIO

Procesado: ĉu mito aŭ realo?

Laŭ la volo de la ŝtatoj subskribintaj la ĝeneralan akton de Berlino de la 26a de februaro 1885, estis kreita la Sendependa Ŝtato de Kongolo (poste Kongolo Belga kaj nun Zairio). Ŝtatestro iĝis la belga reĝo Leopoldo 2a. Okdek jarojn daŭris la koloniado, dum kiu la zairianoj ofte kontraŭstaris la belgan superpotencon.

Dum la regado de Leopoldo 2a la Sendependa Ŝtato havis kiel esencan funkcion certigi la provizadon de kaŭĉuko, eburo, kafo, kakao, kupro, oro, diamantoj... profite al Belgio. Dum pli ol unu jarcento la Societo Ĝenerala, tra siaj filioj, enkasigis ĉiujn eksportajn enspezojn el Zairio kaj regis ĉiujn facetojn de la zairia ekonomio. Ĝi ne havis intereson pri favoraj kaj produktemaj investoj, sed organizis la mekanismojn de la subpremo, ankaŭ post la ŝanĝoj en Zairio. En 1980 ĝi enkasigis valoron de 2,5 miliardoj da usonaj dolaroj pro eksportoj el Zairio. Tuj antaŭ la proklamo de sendependeco de la 29a de junio 1960 la belga registaro subskribigis al la estonta ĉefministro Patrico Lumumba amikan kontrakton pri kunlaboro kaj teknika helpo.

Malfeliĉe, la rekono de la kapableco kaj egaleco de la kunkontraktantoj ne estis akirita. En aŭgusto 1960, interkonsento pri likvido de la Centra Banko de Belga Kongolo kaj Ruando-Urundio estis akirita en Ĝenevo (Svislando) inter la registaroj belga kaj zairia. Iom poste, antaŭ la zairia senato, ĉefministro Lumumba denuncis ĉiujn interkonsentojn, akuzante la belgan registaron, ke ĝi ĉerpis el la rezervoj de oro kaj devizoj de la Centra Banko. Lumumba mortis (tre verŝajne murдите) komence de 1991.

Kiam oni komprenas la funkciadon de koloniismaj ekonomioj, kies riĉeco baziĝas sur kontraktoj, kiuj nur profitas al ili, estas nenia surprizo pri la longa listo de procesoj, kiuj kontraŭmetas Zairion al Belgio.

La minejo de Shinkolobwe estis la ĉefa, eble la nura provizanto de uranio, kiu kontribuis al la fabrikado de nuklea energio de la ĉefaj potencoj nukleaj de tiu epoko (Usono kaj Britio). Grandegaj riĉaĵoj estis trompkaŝitaj profite al Belgio, kvankam la minejoj estis zairia posedaĵo.


En januaro 1967 prezidanto de Zairio Mobutu ŝtatigis la posedaĵojn de la belga *Union Minière* en novan entreprenon Gécomin (ekde 1973 nomita Gécamines). Reage al tio Societo Ĝenerala proprigis al si la akciojn de la Benguelo-fervojo (fervojo tra Angolo, grava por transporto el zairiaj minejoj). Nur kiam en 1988 la zairia parlamento publike diskutis pri la procesado, multaj zairianoj eksciis, ke estis tiaj problemoj. Laŭ la financa kaj ekonomia raportoj de la Tutlanda Konferenco en Zairio

La Société Générale de Belgique kaj Zairio

La *Société Générale* (Societo Ĝenerala) estas fifama nomo en belga kaj zairia ekonomia historio. Tiun holdingan kompanion fondis en 1822 la nederlanda reĝo Vilhelmo (tiam Belgio kaj Nederlando estis unu ŝtato). Post la sendependiĝo de Belgio en 1830 ĝi iom post iom iĝis la ĉefa ekonomia potenco en Belgio, kun filioj en ĉiuj sferoj de la ekonomia vivo, do ankaŭ en la belga kolonio. Unu el tiuj filioj estas *Union Minière* (Unuiĝo Mineja), kiu (i.a.) ekspluatis la zairiajn minejojn kaj prilaboris la ercojn en siaj belgaj fabrikoj. Alia filio estas *Banque Belgo-Zairoise* (Banko Belga-Zairia), pli bone konata kiel „Belgolaise”.

Laŭdire la belga reĝa familio ĉiam havis grandan influon je la decidoj de la Societo Ĝenerala. En 1988, post heroa enborsa milito, la holdingon akiris la itala financisto Carlo De Benedetti (grupo Olivetti). Nun ĝi estas filio de franca grupo Suez kaj grandparte perdis sian prestiĝon kaj influon. RR

(1992), bazitaj sur doganaj ciferoj, Belgio ŝuldas al Zairio pli ol 2000 miliardojn da usonaj dolaroj. Per tiu sumo Belgio povus subteni la buĝeton de Zairio dum preskaŭ 50 jaroj kaj, se tiu mono estus tre bone mastrumata, la lando bone evoluus kaj ĝia ekonomio ege kreskus. Ĉu tiu procesado estas nur mito? Se jes, kial en 1988 la registaroj de Belgio kaj Zairio tiom longe diskutis? Ĉu tio estas nur zairia revo? Zandandu Ntomono ZOLA





Sumoj en dolaroj donas nur nekompletan bildon pri la tuta problemo. Ekzemple en aziaj landoj la ŝuldoj konsistigas 97% de jaraj eksportenspezoj, sed en sudaj afrikaj landoj 333 procentojn! Tio signifas, ke ili devus uzi sian kompletan enspezon de eksportado dum pli ol tri jaroj por repagi siajn ŝuldojn.




Belgio ŝuldas al Zairio 2000 miliardojn da usonaj dolaroj, ne da zairoj...

SKOTLANDO

Malkovru
„Malkovron“!

Kvankam Discovery disponis pri 450-ĉevalpova vapor-maŝino, ĝi ekipiĝis kiel trimasta barko.



Ŝipestro Scott (2a de maldekstre) kun aliaj oficiroj kaj esploristoj surkomandeje de Discovery.

Evidente, ke tra jarcentoj maro kaj maristoj, ŝipoj kaj ŝipistoj kernan rolon ludis en la historio de insulolando Britio. Nur lastatempe la brita ŝiparo, kaj mararmea kaj komerca, ŝrumpis ĝis preskaŭ nenio – sed jen alia historio.

Feliĉe, tamen, konserviĝas en Britio ŝipoj el diversaj epokoj: plejparte (kaj eble kritikende) militŝipoj, sed ankaŭ tiuj, kiuj pace servis al komerco aŭ al scienco. Inter ĉi-lastaj elstaras *Discovery* (Malkovro), vizitebla en la skota urbo Dundee¹ [Dendi].

Discovery lanĉiĝis en Dundee en 1901 koncipita kiel esplor-ŝipo por britaj antarktaj, eventuale sud-polusaj ekspedicioj. Pro tio la ŝipo fortike konstruiĝis por kontraŭstari i.a. glacieron – kaj tiel solide konstruiĝis *Discovery*, ke malgraŭ du-jara kaptiteco inter antarktaj glacimontoj ĝi finfine, kaj sen difekte, liberiĝis.

Ĉefcelo de la ekspedicioj estis esplorado de la tiam – kaj eble nun – apenaŭ konata sud-polusa regiono. Do videblas surŝipe malgranda laboratorio, kie la kvin natur-sciencistoj informojn kolektis pri marbiologio, meteorologio, magnetismo, geologio kaj ornitologio.

Same viziteblas la kuirejo, kie prepariĝis i.a. pingvenaĵo por la 47 ŝipanoj, kaj la kajuto de la ŝipestro Robert Scott [Robet Skot], kiu revis pri konkero kiel unua la sudan poluson – revo ne realiĝinta, ĉar kvankam Scott ja atingis la poluson (en 1910) li je 34 tagoj malfruis: norvega esploristo kaj rivalo Amundsen jam ĉeestis. Revene de la poluso, kaj nur 18 km for de nutraĵodeponejo, Scott kaj liaj akompanantoj, terure febliĝintaj pro malvarmo kaj malsato, mortis.

Ĝis 1931 *Discovery* plurfoje esploris sudajn, antarktajn marojn: tiam ĝi fariĝis trejnado-ŝipo kaj finfine, en Lon-


dono, muzeo. En 1986 *Discovery* revenis al sia „naskiĝ“-haveno, Dundee, kie nun videblas ne nur la ŝipo sed ankaŭ apuda ekspozicio, inkluzive de impona holograma prezentado, dediĉita al Antarkto kaj ties esploristoj. Valoras vizito: la centro-*Discovery* situas en Dundee inter la stacidomo kaj la rivero kaj estas ĉiutage malfermita ĝis somere la 17a, vintre la 16a horo. Kritiko: ŝajneble mankas informoj en lingvoj krom la angla – do kunportu propran vortaron!

Paŭlo GUBBINS

1. gaele: Dun-déagh, Dun-dè [Dun-djejj].

La germana

DEUTSCH



La germana estas lingvo, kiu spertis multajn suprenirojn kaj malsuprenirojn dum sia historio. En la nuntempo, ĝi estas en fazo de kreskado pro la ekonomia forteco de la Federacia Respubliko. Aparte en orienta Eŭropo ĝi nun trovas multajn studantojn, ĉi-foje ne pro milito devigitajn. Ĝin parolas ĉ. 118 milionoj, kiel la ĉefan lingvon en Germanio, Svislando, Aŭstrio, Liĥtenŝtejno, kaj kiel minoritatan lingvon en apudaj landoj kiel Belgio. Ekster Eŭropo ĝi ne estas tiel utila komunikilo¹, tamen kiel perilo de riĉa kulturo ĝi ĉiam estas valora por studemulo.

Unue, kio estas la germana? Povas esti seniluziige por tiuj, kiuj studis la lingvon eksterlande, konstati, ke preskaŭ neniuj fakte parolas la lingvon, kiun oni instruis al ili, kvankam oni ja aŭdas ĝin en televido kaj radio. Inter si, aŭstroj, germanoj kaj svisoj parolas sufiĉe distancajn dialektojn. Ekzemple germano povas ne kompreni la dialektojn parolatajn en Svislando (kolektive nomataj *Schwyzerdütsch* [Ŝvicridi^uĉ]). Ekzistas du grandaj dialektaroj: *Hochdeutsch* [Hoĥdojĉ] (alta germana) en la pli monta sudo, de kiu la prestiĝa „norma germana” estas speco, kaj *Plattdeutsch* [Platdojĉ] (malalta germana) en la nordo.

Sed ĉiuj preskaŭ ĉiam skribas nur en la norma lingvaĵo. Do eblas fari interesan komparon kun la araba (vidu MONATOn n-ro 1993/11). Ambaŭkaze oni parolas multajn tre diversajn dialektojn en ĉiutaga vivo, sed

komprenas unuecan, kulturen speccon tra la tuta regiono. Ĉi tiu baziĝas sur la skriba formo, sama ĉie, kiu ŝuldiĝas origine al sankta libro, – kaze de la araba, la korano, kaze de la germana, la traduko de la biblio farita de Martin Luther en 1534.

La germana prononco estas klara kaj oni povas senhezite prononci vorton laŭ ĝia ortografio. La ĉefa apartaĵo de ĉi tiu estas, ke ĉiu substantivo devas komenciĝi per majusklo (en la dana iuj ankoraŭ faras same). En Germanio estas vokoj por ŝanĝi tion, ĉar nun ĉiu devas scii, kio estas substantivo kaj kio ne. Ekzemple *Montag* (lundo), sed *montags* (lunde).

Alia, malpli unika apartaĵo de la germana estas la t.n. *Umlaut* (vokalmodifo, i.a. en la pluralo de substantivoj kaj verboformoj), kiun montras dupunkta supersigno. Ekzemple, *Satz* [zats] (frazo), *Sätze* [zets^a] (frazoj). Tion oni povas kompari kun la lingvoj, kiuj praktikas „vokalharmonion” kiel la finna kaj turka, en kiuj ĉiuj vokaloj en unu vorto devas prononciĝi aŭ en la antaŭo, aŭ en la malantaŭo de la buŝo.² Se oni aldonis al germana vorto finaĵon, ofte necesis ŝanĝi kelkajn ĝiajn vokalojn per umlaŭto por obei ĉi tiun regulon. La germana certe ne estas fanatika pri tio, kaj multaj vortoj jam perdis la finaĵojn, kiuj instigis la vokalaŝanĝon. Sed oni povas observi en la ekzemplo, ke la *a* ŝanĝiĝis al la buŝantaŭa *ä*, kiam oni aldonis la buŝantaŭan fin-

aĵon *-e*. La sama fenomeno troviĝas ankaŭ en la aliaj ĝermanaj lingvoj.

Ĉiu germana substantivo, ĉu kun viva, ĉu kun neviva aludo, havas unu el tri genroj: vir-genron, in-genron aŭ neŭtron. Kiel kutime en hindeŭropaj lingvoj, la genro estas arbitra. Do *der Löffel* (la kulero) estas virgenra, *die Gabel* (la forko) estas ingenra, kaj *das Messer* (la tranĉilo) estas neŭtra. Kiel videble, la vorto por „la” ŝanĝiĝas laŭ genro. Ne estas facile diveni la genron de nekonata vorto, kvankam iuj finaĵoj donas sugestojn. Ekzemple *-chen* (*-eto*) ĉiam kreas neŭtran substantivon, eĉ kaze de viva persono (*das Mädchen*, la knabino). En unu okazo, nur genro apartigas du vortojn: *der See* estas la lago, dum *die See* la maro.

La artikoloj (kaj adjektivoj kaj, iam, substantivoj) ŝanĝiĝas ne nur laŭ genro, sed ankaŭ laŭ kazo. La germana posedas kvar: nominativan, akuzativan (*-n*), genitivan (*de*) kaj dativan (*al*). La multoblaj uzoj de iuj formoj de la difina artikolo (=la) postulas atenton: *der Löffel* estas nominativa, virgenra kaj singulara (la kulero), sed *der Gabel* estas dativa, ingenra kaj singulara (al la forko) kaj *der Gabeln* estas genitiva, ingenra kaj plurala (de la forkoj). Kompreni en kunteksto ne estas malfacile, sed lerni aparte la diversajn adjektivajn finaĵojn, povas esti malsimple por studanto. Parenteze, ĉi tiuj komplikaj ŝanĝoj troviĝas, kiam la adjektivo antaŭas la substantivon, sed ne kiam ĝi venas poste. Do *der gute*

Mann (la bona viro), *sed der Mann ist gut* (la viro estas bona).

Dua kaŭzo por eltirado de haroj inter eksterlandaj studantoj estas la germana verbo. Multaj el ili estas neregulaj (eŭfemisme nomataj „fortaj”), kvankam aliaj („malfortaj”) estas regulaj kaj facilaj. Unu el la plej strangaj ecoj estas la dispartigeblaj verboj, kiel *ablehnen* (rifuzi): *sie lehnen ab* (ili rifuzas) kaj *fernsehen* (spekti televidon): *sie sehen fern* (ili spektas televidon). Ofte troviĝas multaj vortoj inter la du partoj: *Sie sehen jeden Abend von halb sieben bis neun Uhr zwanzig im Wohnzimmer fern* (ili spektas televidon ĉiun vesperon de duono post la sesa ĝis dudek post la naŭa en la sidĉambro).

Tio kondukas al la tria (fi-?)fama apartaĵo de la germana – ĝia vortordo. Kvankam estas ĝenerala regulo, ke verbo venas kiel dua ideo en frazo, ofte tiu estas helpverbo, kaj al la germanoj plaĉas ekzili siajn ĉefverbojn ĝis la fino de la frazo pro la plej bagatela preteksto. Frazo kiel *Ich bin gestern vormittag mit dem Zug nach Frankfurt in Geschäftsreise gefahren* (laŭvorte: Mi estas hieraŭ antaŭtagmeze per la trajno al Frankfurto en negocvojaĝo veturinta) estas kutima. Oni atendas spirretene la ĉefverbon, por fine esti certa pri la signifo de la tutaĵo.

Alia komence malfacila eco, precipe de la burokrata (ne konversacia) lingvaĵo, estas la ŝato por t.n. enkapuligoj, en kiuj oni utiligas preskaŭ tutan frazon kiel adjektivon, kaj la ĉefan substantivon oni devas longe atendi. Tiu observebla en ĉi tiu frazo eco ne estas unika al la germana; ĝi ja similas al la en la japana kaj en la ĉina tute normala vortordo.

Eksterlandanoj ofte timas la tre longajn „serpentvortojn” (*Schlangenwörter*), kiujn ŝatas precipe la burokrata lingvaĵo. En praktiko ili ne longe estas problemo, kiam la lernanto ekpovas dividi (kaj foje subdividi) ilin en iliajn konsistigajn partojn. Vortoj kiel *Bundesverteidigungsminister* ne estas malkutimaj. Ĝi konstruiĝas el tri konataj vortoj: *Bundes-* (federacia), *-verteidigungs-* (defend’) kaj *-minister* (ministro). Helpaj por rekonni la „subvortojn” estas la genitiva finaĵo *-s*, kaj afiksoj kiel *ver-* kaj *-ung*. Objektive, ne estas grave, ĉu lingvo skribas tiujn vortojn aparte (kiel la angla) aŭ kune. Ja la tajoj kaj kamboĝanoj skribas tutajn frazojn sen spacoj kaj ne havas malfacilon legi sian lingvon. Ĉio dependas de kiel oni difinas la vorton „vorto”.

La germana ne estas tiel entuziasma pri pruntvortoj kiel iuj aliaj lingvoj. Kiam eble, ĝi preferas fidi al la pro-

praj rimedoj kaj krei proprajn kunmetitajn vortojn. En okazo de „telefono” ekzistas apude pruntvorto *Telefon* (aŭ *Telephon*) kaj (preskaŭa) prunttraduko *Fernsprecher* („malproksim-parolilo) farita el germanaj radikoj. Eble pro tio la germana donis mirige malmultajn pruntvortojn al aliaj lingvoj. Tamen, multaj (precipe en la skandinavaj lingvoj) estas kaŝitaj, ĉar ili estas prunttradukoj. Eble „medi-amika” originis en la germana *umweltfreundlich*. Esperanto sendube danku al la germana por multaj tiaj. Eble ĝi estas sence „kulpa” pri la debateblaj esperantaj kunmetaĵoj „rideti” (*lächeln*) kaj „alveni” (*ankommen*)³. Kiel por la internacia lingvo, la kunmetado de vortoj estas neelĉerpebla fonto por krei novajn. Se la germana gramatiko estas plena de (por eksterlandano) malfacilaj kaj pedantaspektaj gramatikaj reguloj, tiuj tamen kontribuas al la precizeco kaj klareco de la lingvo, unu el la plej rekompencaj inter la mondlingvoj.

Bradley KENDAL

1. Tamen en multaj lokoj en Ameriko estas komunumoj (kelkfoje eĉ tutaj vilaĝoj aŭ kvartaloj), kies normala lingvo estas la germana (ekz. en Argentino, Paragvajo, Brazilo, Nord-Ameriko). Cetere, la precipe germanorigina jida estas grava internacia komunikilo – ne nur en Ameriko – de enmigrintaj aŝkenazaj judoj. (red.)
2. En origino la du punktoj sendube venas de tiu de la litero *i*, la plej elstara buŝantaŭa vokalo. Do antaŭa *ü* estas kombinaĵo de *u* (malantaŭa) kaj *i* (antaŭa). En interesa koincido, la koreoj en sia han'gŭl-alfabeto kombinas la simbolon por */i/* kun simboloj por malantaŭaj vokaloj por antaŭigi la prononcon de tiuj ĉi.
3. Notebla ekzemplo en la zamenhofa verkaro estas la kadukiĝinta verbo „elrigardi” (aspekti), el la germana *aussehen*. (red.)

Dum dek monatoj Bradley Kendal prizorgis la serion „La mondaj lingvoj”. Jen lia dek-unua kaj lasta kontribuo. MONATO sincere dankas al sia kunlaboranto pro tiu ĉi granda atingaĵo.

En tiu ĉi serio aperis:

La ĉina (n-ro 1993/2), la angla (n-ro 3), la rusa (n-ro 4), la hispana (n-ro 5), la hindustana (n-ro 6), la bahasa (n-ro 7), la portugala (n-ro 8), la japana (n-ro 9), la franca (n-ro 10), la araba (n-ro 11) kaj la germana (n-ro 12).

REAGO

Neniu estas ĉioscia

Bradley Kendal traktis la japanan en la septembra numero. Li sukcesis lerte resumi por laikoj ĉefajn trajtojn de tiu lingvo pli malpli ĝuste en la malvasta spaco, sed pri detaloj malveraĵoj interplektiĝas kun veraĵoj.

1. Li diras, ke ekzistas ne verbotempoj sed aspektoj. Ja ekzistas tempoj: prezenco kaj preterito; en kombino kun aspektoj: prezencoj imperfekta kaj perfekta, kaj preteritoj imperfekta kaj perfekta.

2. La klarigo, ke la partikulo *wa* reliefigas novan informon, kaj *ga* la malnovan, estas inversa. *Wa* postsekvas substantivon jam konatan, tial enton pri kiu ekzistas malnova informo, kaj *ga* kiu provizas novan informon.

3. La tri niveloj de ĝentileco, kiujn li prezentas, estas galimatio. Troviĝas du klare distingendaj kategorioj de esprimo de respekto: tiu de ĝentileco kaj tiu de respekto-humileco. En la unua temas pri lingvostiloj, koncerne la duan personon kaj havantaj du niveloj: ordinaran kaj ĝentilan. En la kategorio de respekto-humileco temas pri la laŭsocistructura trakto de aliaj, dua- kaj tria-personaj, fare de la unua persono (la parolanto) kaj kiu koncernas la subjekton de la frazo kaj havanta tri nivelojn: respektan, neŭtralan kaj humilan.

Oni povas elekti inter eblaj kombinoj de po unu el ĉiu el la du kategorioj. Ĉiuj estas ĵetitaj en ĥaosan mikspoton en la tabelo malsupre de la 3a kolumno en paĝo 20. Bradley diras, ke *de gozaimasu* estas „honoriga”. Ĝin uzas iu, alparolante superulon: „Tio estas hundo”. Tio markas ties respekton al la alparolato (dua persono). Temas pri la stilo, kaj respekto al hundo ne estas montrita. Li diras ankaŭ, ke *irassayaimasu* estas same honoriga. Tiun ĉi formon oni ne povas uzi pri hundo, ĉar ĝi esprimas respekton al la subjekto, temas pri laŭstatusa trakto. Oni povas uzi ĝin, volante diri: „Li estas ministro pri financo, ĉeestanta aŭ ne (Ne gravas, ĉu vere la parolanto respektas lin. Tre povas esti, ke li malestimas lin.) Dume oni povas ne uzi la ĝentilan stilon, parolante al subulo sed retenante respekton, ŝajnan aŭ sinceran, al la ministro: do *de irassyaru* (ordinara, aŭ neĝentila stilo, kombinita al respekta formo).

La malo de *ageru* (doni, humila formo, subrangulo donas humile al superulo) ne estas, kiel li diras, *kureru* (doni, neŭtrala formo, entenanta ne-

nian implicon pri la socia statuso), sed *kudasaru* (doni, respekta formo, altrangulo degne donas al subulo).

4. La diferenco inter la lingvo de viroj kaj virinoj praktike ne ekzistas en skribo, kaj tiel estas pri konversacio inter edukitaj homoj en formalaj okazoj. Ĝi ekzistas nur en neformala interparolado. Ju pli alte edukita la virino, des pli ŝia stilo estas nedistingebla de tiu de viroj.

Aliaj misoj: La grafiko de japana skribaĵo entenas du erarojn². Japanoj ne diras „du libroj da bananoj”, *hon* estas libro kiel sendependa substantivo sed estas „stang(et)o” kiel nombrilo de longaj aĵoj.

Bradley Kendal mirigas pri sia vasta kono de lingvoj, sed ne povas esti ĉioscia. Mi rekomendas, ke pri malgrandaj lingvoj, kiaj la japana, li igu fakulon kontroli lian manuskripton, sed ne iun ajn japanon. Simpla denaska parolanto povas servi nur kiel informanto, ne kiel konsilanto pri eĉ iomete teoriaj aferoj.

YAMASAKI Seikō

1. Terminologio esperanta ne estas establita. Bonvolu kompreni min ne per terminoj, sed per tio, kion mi al ili signifigas.
2. Pri tiuj eraroj kulpas ne Bradley Kendal sed la grafikejo de FEL, kies kono de la japana ne estas brila (eld.).

Ni dankas al Yamasaki Seikō pro lia klarigo de ĉi tiuj subtilaĵoj, kiuj por nejapanoj ŝajnas ege komplikaj. Ni havas la impreson, ke la malfacilaĵoj de la japana estas pli ceremoniaj ol gramatikaj, do kredeble, por majstri ilin, oni konu la riĉan kulturon de Japanio. Pro tio la japana verŝajne ne anstataŭos Esperanton kiel kandidatton por la rolo de internacia helplingvo. Tio trankviligos almenaŭ leganton Hektor Alos i Font (vd. rubrikon „Leteroj” en MONATO 1993/9, p. 6). (Red.)

IRLANDO

Du doktoroj – du lingvoj

La 31an de julio 1893, dek du personoj kunvenis en la mezo de Dublino, Irlando, kaj fondis la Gaelan Ligon (*Conradh na Gaeilge*), por revivigi kaj refortigi la preskaŭ mortintan irlandan lingvon. La prezidanto de la kunveno estis Dúbhglas de h-Ide, kiu en 1938 fariĝis prezidanto de la Irlanda Respubliko.

De h-Ide naskiĝis en marto 1860,

nur kelkajn monatojn post la naskiĝo de Lazaro Zamenhof, kaj same kiel tiu ĉi li dediĉis sian tutan vivon al la antaŭenigo de lingvo. En la nuna jaro en Irlando oni memorfestas la fondon de la Gaela Ligo kaj la vivlaboron de De h-Ide.

La irlanda (aŭ pli ĝuste la irlandgaela) lingvo apartenas al la granda hindeŭropa lingvofamilio. Ĝi tre similas al la skotgaela kaj la manksgaela, kaj estas parenca al la kimra, la kornvala kaj la bretona. Ĉi tiuj ses estas keltaj lingvoj.

La keltoj venis al Irlando ĉirkaŭ la jaro 300 a.K. Nu, estis loĝantoj en Irlando de 6000 jaroj a.K. kaj la lingvo de la keltoj, kombinita kun la antaŭkeltaj lingvoj, formis la irlandan gaelan, kiu post nelonge fariĝis la sola lingvo parolata sur la insulo.

La plej fruaj skribaĵoj, en la tria jarcento p.K., estis en la oghama (oma) alfabeto, kiu konsistis el strekoj, kaj en la kvina jarcento la latina (roma) alfabeto envenis kun kristanismo.

Influis ĝin unue la latina, kaj poste la skandinava, la normandfranca, kaj la angla, sed ĝi restis sufiĉe pura.

Pro la normandfranca kaj angla invadoj, la angla ekanstataŭis la irlandan unue inter la superaj klasoj, pro subpremo de la irlanda nobelaro ekde la 17a jarcento. Tamen estis nur en la 19a jarcento ke la angla fariĝis la lingvo de la plimulto. La lingvoŝanĝo okazis iom rapide pro la jeno:

- la „granda malsatego”
- elmigrado al anglalingvaj landoj
- fondado de anglalingvaj unuagrada lernejoj tra la lando
- manko de estroj kiuj konsilus la dulingvecon.

En 1851 nur unu kaj duona milionoj de la popolo (23 %) ankoraŭ parolis la irlandan.

La Gaela Ligo vigle laboris, propagandante kaj instruante la lingvon, kaj fondante centojn da kluboj, kaj kiam fondiĝis la Libera Ŝtato de Irlando en 1922, tiu laboro akceliĝis.

Kio do estas la nuna situacio? La irlanda estas la nacia kaj la unua oficiala lingvo kaj la angla la dua oficiala. La angla estas la plej multe parolata, sed en naŭ regionoj la irlanda estas la parolata lingvo. El la popolo 28 % bone scias la irlandan, sed nur 10 % uzas ĝin konstante kaj ofte. Dume, 40 % povas bone legi ĝin kaj 11 % konstante spektas televidprogramojn en la irlanda. Ĝi estas instruata kiel studobjekto al ĉiuj infanoj en ĉiuj lernejoj.

Tamen minacas ĝian kreskon la terura premo de la angla lingvo, el Britio unuflanke kaj Usono aliflanke, kaj ankaŭ la kreskanta neceso lerni kromajn eŭropajn lingvojn, kiel la fran-

can, germanan, italan, pro irlanda membreco en la Eŭropa Komunumo. Aliparte, la nombro de tutirlandaj infanlernejoj, bazlernejoj kaj mezlernejoj, daŭre kreskas; t.e. lernejoj en kiuj nur la irlanda lingvo estas uzata, escepte de la anglalingvaj klasoj. Pliaj tutirlandaj lernejoj fondiĝas ĉiun jaron. Do, malgraŭ ĉio la lingvo progresas – sed treege malrapide. Ĉu Esperanto povos helpi al ni savi ĝin? Pasante, la irlanda donis al Esperanto kelkajn vortojn: *viskio* (la „akvo de vivo” (*uisce beatha*), *slogano* (frapfrazo), *huligano* (stratulaĉo), *fiakro* (tra la franca), *klano*, *bardo*,...
Liam 'O CUIRC

En la oktobra numero de MONATO iom miksiĝis la subskribo sub la foto en paĝo 20. Jen la ĝusta versio:

Supra bildo, de maldekstre supre en horloĝmontrila direkto: Sovetio, Irlando (malnova), Ukrainio, Hungario, Bulgario (malnova) kaj Slovenio. Meze: Litovio.

Suba bildo, de maldekstre supre en horloĝmontrila direkto:

Estonio, Latvio, Kroatio, Albanio, Makedonio, Mongolio, Sovetio (nova), Sovetio (malnova), Belorusio kaj meze Irlando (nova de-segno).

Ni pardonpetas.

La lernado de lingvo

Multaj homoj eraras kaj erarigas dirante, ke ili volas lerni lingvon. Ili ne volas lerni lingvon, sed koni kaj uzi ĝin. Ili ignoras aŭ simple ne konscias, ke la lernado de lingvo postulas monatojn (por Esperanto) aŭ jarojn (por alia lingvo) de laborema kaj senĉesa klopodado, do volforton kaj firman konstantecon, kies kvalitoj ne troviĝas en ĉies atingeblo.

Tamen tiaj ecoj, se ili ne ekzistas nature, povas enhome fariĝi per forta deziro atingi certan celon. La per lingvoscio pristrebata situacio eble estas salajraj avantaĝoj, pli alta profesia nivelo, sentimentaj rilatoj, novaj konaj horizontoj aŭ helpo en la realigo de idealo. Verŝajne la materiaj motivoj multas plie ol la spiritaj kaj idealaj.

En artikoloj de Esperanto-revuoj oni jam insistis plurfoje kaj tre trafe, ke konvenas provoki la strebon lerni Esperanton motivigante ĝin per jam ekzistantaj intereso kaj hobiaj.

Sed ankaŭ konsilindas klarigi al la lernantoj, ke la formado de konstanta kaj firma volo tre gravas por respondi la defion kaj venke sukcesi en la tasko akiri valoran scion.

Werner SCHAD

Aŭtunaspekta sed streĉa

Infero en aŭtuno estas mallonga sed sufiĉe streĉa krimromaneto, supozeble originale verkita en Esperanto, de la konata Bernard Golden. Kiu dum la legado kredas scii, kiel finiĝos la rakonto, plej verŝajne eraras. Okazas ja kelkaj neatenditaj ŝanĝiĝoj.

Literature la verketo estas senprentenda, sed en krimromano oni ja ne atendas stilajn geniaĵojn.

Aspekte la verko estas pli ol modesta: vinktitaj paperfolioj sen kovrilo, sen iom da koloro, krime mornaj... Malgraŭ tio ŝatantoj de la ĝenro vlos posedi ĝin.

Paul PEERAERTS

Bernard Golden: *Infero en aŭtuno*. Eld.: Debrecena bulteno, Debreceno, 1993. 47p. Prezo ĉe FEL: 150 BEF, ĉe UEA: ne jam havebla.

Aĉetinda kaj donacinda

Impona verko, ne nur pro ĝia amplekso, sed precipe pro ĝia riĉa kaj varia enhavo, estas *Kybernetische Pädagogik* (Klerigkibernetiko), kun artikoloj kaj studoj de Helmar Frank kaj kunlaborantoj, eldonita de Vera Barandovska-Frank. Temas pri represo el plej diversaj revuoj kaj prelegkolektoj en la formo de 1136 paĝojn ampleksa, tolaĵe bindita libro, enhavanta 106 originalajn sciencajn, popularigajn kaj lingvopolitikajn artikolojn. Ili kun- aŭ sola aŭtoro estis inter 1973 kaj 1992 Helmar Frank, la iniciatinto de la kibernetika pedagogio kaj nuna prezidanto de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) en San Marino.

La verko enhavas i.a. la bazajn tekstojn pri la pedagogia, kibernetika kaj politika utilo de Esperanto. Ili originale aperis kaj estas represitaj en la germana, angla, franca, itala, japana kaj en Esperanto mem. Aliaj tekstoj temas pri kibernetika psikologio, komputilingvistiko, kleriga kibernetiko kaj la enfiltriĝo de Esperanto en la sciencojn, precipe kadre de la historio de AIS.

El la 106 artikoloj, 23 estas verkitaj en Esperanto. Ĝi tiel fariĝis dum la dokumentitaj dudek jaroj la plej grava klerigkibernetika publikiga lingvo post la germana.

En apendico estas difinitaj la plej

gravaj fakterminoj. Registro de 27 paĝoj, kun traduko de la ŝlosilvortoj, kunligas la verkon kun la (ankoraŭ haveblaj) 5 volumoj pri la pionira tempointervalo 1958-1972. Atenta trarigardo de la libro kaj legado de pluraj artikoloj konfirmas ĝian altnivelan valoron por klerigokibernetikistoj, interlingvistoj kaj esperantistaj instruistoj, montrinda al kulturpolitikistoj kaj aĉetindaj de aŭ donacindaj al universitataj kaj urbaj bibliotekoj.

Edward SYMOENS

Helmar Frank: *Kybernetische Pädagogik*. Eld.: Akademia Libroservo, Bratislava - San Marino - Berlin, 1993. Prezo ĉe FEL: 1590 BEF, ĉe UEA: 83,40 NLG.

Nesufiĉe redaktita

Poemaro de kroatoj en Hungario celas prezenti la verkojn de la kroatlingva malplimulto en Hungario. La verkoj devenas de la plej lastaj generacioj de verkistoj, kun naskiĝdatoj inter 1935 kaj 1960. Temas pri relative eta etna grupo de ĉ. 100 000 homoj entute, tial la verŝajneco, ke ekestos el tiu grupo vera majstro devas esti malgranda. Sekve ne vere surprizas la fakto, ke la prezentitaj poetoj ŝajnas esti tre minoraj. Veran poetan voĉon mi trovis nur en unu poemo, „La belaĵoj forgesis min” (*Mene su lepote ostavile*) de Josip Gujas-Džuretin.

La temoj pritrakitaj estas diversaj, kun pluraj poemoj pri amo, filozofado pri la homa sorto kaj pri Kroatio. Rilate ĉi-lastan temon, evidentigas bedaŭrinda manko de notoj, necesaj se la libro celas tutmondan legantaron. Por nekroato legi poemon kun la komenco „Venu al mia trankvil’ / diras / Maksimir” havas neniun signifon, ĉar plej probable la leganto ne scios, ke Maksimir estas parko en Zagrebo.

La manko de notoj estas nur unu indiko pri nesufiĉe redaktita volumo. Tre malhelpas al la leganto la maldiligenta kompostado, pro kio svarmas eraroj. Plejparte temas pri eraroj de la plej ĝena tipo, nome la anstataŭigo de vorto per alia simila vorto, kiu tamen ŝanĝas la tutan signifon de la verso, ekz. vintro anst. vitro, per anst. por, faras anst. falas, venkis anst. velkis. Agnoskendas, ke troviĝas slipo en la libro kun listo de 34 eraroj. Necesas tuj fari la necesajn ŝanĝojn al la teksto antaŭ ol eklegi. Al tiu listo mi devas aldoni „truon” anst. „turon” (p. 26) kaj „se”

anst. „sed” (p. 64). Cetere, okazis miskopiado de la vorto „fluton” el la dua parto de poemo al la unua parto (p. 46), tiel ke ekestas la sensenca verso „Ĉu vi trovis fluton / ĉe miaj sangolarmoj” anst. „Ĉu vi trovis fonton / de miaj sangolarmoj”.

Kaj laste, kvankam laŭvorta traduko de poemoj ne eblas, tradukisto devas tamen strebi redoni la sencon de la originalo. Pluraj tradukoj en ĉi-volumo estas neakcepteble liberaj, aparte kiam la tradukintoj ĉasante rimvortojn sentis la bezonon tordi la signifon. Jen kelkaj ekzemploj: la traduko parolas pri „krucvortoj neintimaj” dum la poeto diras „krucvortoj ne la samaj”; „timo” en la originalo fariĝas „rezigno”; „patrin’ maljuna” fariĝas „patrin’ nobela”. Plurfoje troviĝas en la tradukoj konceptoj kaj priskriboj, kiuj ne aperas en la originaloj.

Se la eldonantoj opinias, ke indas prezenti la verkojn de tiuj poetoj, ili prezentu indajn tradukojn. Mi do konsilas, ke oni tuj preparu duan zorge trarastitan kaj rigore redaktitan eldonon.

Krys UNGAR



Radenko Milošević (red.): *Poemaro de kroatoj en Hungario*. Tradukis el la kroata diversaj aŭtoroj. Ilustr. Eld.: Kroata Esperantista Unuiĝo, Zagreb, 1992. 140p. Prezo ĉe FEL: 300 BEF, ĉe UEA: 15 NLG + afranko.

Recenzo de recenzo de recenzo...

Olav Reiersøl publikigis diversajn librojn ĉefe pri verbaj formoj en Esperanto. Pri ili aperis recenzoj, ne ĉiam favoraj, en *Esperanto*, *Franca esperantisto*, *MONATO*, k.a. Sub la nomo *Kritikoj de recenzoj* Reiersøl publikigis nun siajn refutojn. Por eviti, ke iam aperos kritiko de recenzo pri *Kritikoj de recenzoj*, ni ne recenzas, sed nur mencias la eldonaĵon. Prezo ĉ. 9 guldenoj. pp

de Raita Pyhälä

Pagana kontemplado

Loko: neloĝata insuleto en finna lago, latitudo 64N

Tempo: vitra posttagmezo, marto


Sur la loka mapo troviĝas la nomo „Oferaja insulo” kaj sur iu pli nova eldono „Preĝeja insulo”. „Kion tio signifas?” mi demandis min. Por trovi la respondon, mi parolas kun la vilaĝanoj kaj promenas kelkajn kilometrojn al la insulo laŭ la frostiĝinta vasteco de la lago. (Mi vere promenas sur la akvo, t.e. sur la glacio).

Atinginte la insulon, kiu ampleksas nur ĉ. 50 m x 70 m, mi vidas altan lignan krucon faritan el neskulptitaj grizaj arbotrunkoj kaj apud ĝi benkojn el fenditaj trunkoj. Neniu bruo aŭdeblas. La posttagmeza suno brilas el inter nigraj senfoliaj betuloj. Super ili bluas la ĉielo, blankas nubetoj. Sube, apud miaj botoj verdas musko, grizas likeno, ruĝas vakcinia bero. Ĉe la lagobordo grandaj krudaj ŝtonoj, kiel blokoj el dika griza pratempa glacio. Ne vidiĝas homoj, nur aro da kornikoj flugadas ĉirkaŭen, serĉante fiŝajn vice-rojn, kiujn fiŝkaptistoj forjetadis ĉe la truoj boritaj jen kaj jen en la firman glacieron. La soleco ŝajnas kompleta, liberiganta, kaj mi lasas miajn pensojn vagi.

Jarcentojn antaŭe niaj praavoj enterigis siajn mortintojn sur tiu ĉi insuleto. Mi povas distingi du fosajojn en la tero pli supre sur la deklivo. Onidire la kadavroj tie atendis printempon kaj la degeladon.

Pri kio pensis la praavoj? Certe pri la malfacileco teni sin vivaj dum la vintro, trovi nutraĵon, ĉasadi, fiŝkapti, ne frostiĝi en la arkta nokto, kiu monatojn daŭras. Kion ili adoris? Certe lumon, varmegon, ĉasbestojn, someron. Vintro ja mortigas; somero revivigas. La plej grava elemento por ili devis esti la suno. Post la suno gravas akvo, tero, arbaro kun siaj bestoj kaj plantoj.

El malantaŭ la ligna kristana kruco brilas la suno, la eterna fonto de varmo kaj vivo. Ĉu de eterneco al eterneco, aŭ ĉu de la komenco de tempoj al la fino de esto? La naturo ja ekzistis jam antaŭ Kristo, la naturo ĉiam gravas, kvankam ŝanĝiĝante sed ne malaperante. La griza kruco malaperas en



la koloroj de la arbaro. Apenaŭ oni rimarkas ĝin. Mi vidas la oranĝajn likenojn sur la trunkoj de la tremoloj, la verdajn pinojn kaj piceojn, la sangoruĝan vakcinion, kies suko refreŝigas kaj resanigas.

Antaŭ nelonge estis konstruata eta senfenestra kabano sur la ofera insulo. Dika pinarbo kreskas apud la pordo, kaj la junipero dekstre aspektas kiel giganta verda kandelo.

Origine la kabano estis fiŝkaptista ŝirmejo. En la suba maldekstra angulo de la pordo mi rimarkas enirotruon por katoj, kiuj ĉasas musojn. Tio ja utilis, kiam la kabano estis uzata kiel provizejo.

Nun en la kabano troviĝas nur mensa nutro: Biblio, kaj surporde pendas eta ligna kruco farita el du sekaj branĉetoj. Homoj klopodas kunigi pasintecon kaj nuntempon.

Somere vilaĝanoj remas insulen por siaj vesperpreĝoj, sed nun, vintre, kun mi sur la benkoj sub la kruco sidas niaj praavoj kaj rigardas la subenirontan sunon inter la senfoliaj betuloj malantaŭ la lago. Ili rigardas la blankan glacian vastecon, la nigrajn korni-

kojn, la arbokronojn, nubojn kaj la ĉielon. Ni kune rememoras niajn mortintojn, nian severan vivobatalon, kaj ni atendas printempon, la blujajn flustrantajn ondojn, la miraklon de degelado kaj revivigo.

Misiistoj, kiuj venis finnlanden el la fora sudo, la okcidento kaj la oriento, konvertis miajn praavojn perforte, per glavo kaj timo. Ignorantaj fremduloj rompis la pratempan komunikadon inter homo, tero, ĉielo kaj akvo. Ili starigis krucojn kaj nomis la prafinnan naturan religion hontinda stulto kaj peko. Niajn morojn ili insistis kristanigi. La ofera insulo fariĝis preĝeja insulo kun kristana nomo *Kirkkosaari*. Tamen la okuloj de la paganaj praavoj rigardas tra miaj, kaj ni kune adoras la varmetan posttagmezan sunon super la glacia pejzaĝo. Laŭ ni la suno pli gravas ol la kruco. La suno venkos la vintron. La ĉeloj de la verdaj piceoj kaj pinarboj, de la griza likeno, de la sangoruĝa vakcinio estas sanktaj gardujoj de la vivo, de nia komuna vivo – homa, besta, aŭ planta – en la mirinda, benenda naturo. Ni ne ofendu la naturon!

de Bruno Vogelmann

Ateismo kaj novstila religieco

La jena artikolo estas repliko de Bruno Vogelmann je la opinio de Gilbert Ledon en MONATO 8/93 pri „Kio estas ateismo?”. Pli pri la argumentoj de Vogelmann vi povas legi en lia libro „La nova realismo”.

Ateismo estas neado de Dio. Ateismo ekzistas en diversa formo. La materiisma ateismo pretendas la unuarangecon de la materio el kiu evoluis la spirito. La agnostikisma ateismo lasas nedecidita la problemon de la ekzistado de Dio.

Historie la ateismo aperis relative malfrue, prefere en la 19a jarcento, kvankam ĉiam ekzistis kelkaj ateistoj. Sed la ateismo ne estas la laste aperinta religia fenomeno. Intertempe la evoluo progresis. Post la ekzistencialismo, kiu diras „ĉio estas absurda” aperis Nova Realismo, kiun formulis Bruno Vogelmann kaj laŭ kiu la malamika kontrasto inter diokredo kaj ateismo estas malaperinta. Kial?

La Nova Realismo konstatas, ke la homoj devas liberigi sin de ĉiuj dogmoj kaj dogmobazitaj ideologioj. Ĉar dogmo estas la instrueca formulado kaj fiksado de tiel nomataj absolutaj verajoj aŭ tezoj, kies premisoj estas ekster la eblo de kontrolado. Tio rilatas ne nur religiajn dogmojn sed same dogmojn en ĉiuj sektoroj de la vivo.

Ankaŭ ateismo estas bazita sur dogmoj, ĉar la eldiro „Dio ne ekzistas” estas tia dogmo. Same materiismo, sur kiu ateismo baziĝas, estas dogmeca, same kiel ideismo. Unu deklaras la dogmon: „Unue estis la materio, el kiu ekestis spirito”. La ideismo deklaras: „Unue estis la spirito, kiu kreis la materion”. Neniu el ambaŭ estas pruvebla. Krome, laŭ la rezultoj de la nova scienco de la kogno-evoluo (biogenezo de la racio, do de la pensado) vera kontrasto inter materio kaj spirito, kiel pretendis la filozofoj ĝis nun, ne ekzistas. Kion ni perceptas ekstere de ni kaj ene de ni, estas la ĉiam moviĝanta, ŝanĝiĝanta, evoluanta **vivo**, je kiu apartenas la neorgana vivo de la subatoma kaj atoma mondo, kiu ne estas morta mondo, la organa mondo de plantoj kaj animaloj sen nervoj, la pli alta organa mondo de la vivaĵoj kun animo ĝis la mondo de intelekthavaj vivaĵoj, la homoj. La nova scienco de la kogno-evoluo montras, kiel ekestis

dum la homa evoluo la homa racio, montras la biogenezon de la racio, simile kiel Darwin montris la biogenezon de la homa korpo. Kiu interesiĝas pri tio, legu ekzemple la librojn de Rupert Riedl, unue *Biologie der Erkenntnis* (Biologio de la kogno), kaj *Die Spaltung des Weltbildes* (La disfendo de la mondbildo), aperintaj en eldonejo Paul Parey, Hamburg-Berlin. Tiu scienco montras la internan kaj nedisigeban rilaton inter naturo kaj spirito. Ĝi klarigas fakte la naturon de la spirito kaj la spiriton de la naturo. Rilate la kontraston ateismo-religio tial malaperas la profunda malamikeco inter ambaŭ.

Kio estas religio?

Religio estas diversmaniere priskribebla. Karl Marx diris: „La religio estas la suspiro de la premata homkreaĵo, la animo de senkora mondo kaj la spirito de senspiritaj situacioj. Ĝi estas la opio de la popolo.” Fakte la religio havis diversajn funkciojn en pasinteco kaj nuntempo. La religio donis mondbildon. La religio estis kaj estas konsolo por multaj homoj. Ofte la religio estis misutiligita kaj estis rimedo por pli efika regado kaj subpremado de la popoloj.

Ni rigardu ĉi tie la aspekton, ke la religio donas al la homo klarigon pri la senco de la monda okazado kaj pri la senco de lia propra vivo.

Unue ekestis en la homo, same kiel en la superaj animaloj, la animo, kiu kapablas senti sed ne kapablas pensi. Religio aperis nur post kiam la kapablo de pensado, la racio, estiĝintis. Religio evoluis de animismo, fetiŝismo, ktp. ĝis politeismo kaj monoteismo. Nur poste aperis ateismo, en kiu ni povas certarilate inkludi budhismon. Ĉiuj tiuj estas evolustadioj de la religio.

La kerno de religio

La kerno de la religio, ĝia esenco, estas la konvinko de l' homo pri la **senceco** de la granda vivoprocezo, la monda okazado kaj la konvinko pri la **senceco** de la propra vivo. En kiu maniero la homo ekkognas (komprenas) tiun sensecon, tio dependas de lia evolustadio. Prahomoj estas prefere animistoj, kredis ke en ĉiu alia vivaĵo kaj natura fenomeno (fonto, arbo,

pluvo, fulmo...) estas iu persona potenco, bonvola aŭ malbonvola. La historio de la religio montras, kiel la religia evoluo ŝanĝiĝis. Sed ĉiam ĉiu religio donis al la homo certan konvinkon pri la senseco de la vivo.

Kial ateismo estas religio?

Ĉar serioza ateismo, same kiel la homo dum ĉiuj tempoj, volas trovi sensecon en la granda kosma vivoprocezo kaj trovi sensecon en sia propra vivo.

La primitiva materiisma ateismo simple neas la ekzistadon de Dio kaj la sensecon de la kosma evoluo. Ĝi deklaras, ke unue estis la materio. Sed ĉar tio estas nepruvebla dogmo, la homo restas ne kontentigata, ĉar sen kogno kaj sperto de tiu senseco la homo ne povas vivi feliĉa.

La serioza ateisto esploras kaj rigardas la realon, la grandiozan evoluoprocezon de la mondo. Li travivas kaj ekkognas ke tiu grandioza procezo - spite al multaj malsukcesoj kaj refaloj - enhavas celstrebado kaj naskas ĉiam denove novon. Tial tiu granda kosma evoluprocezo, kiu estas la **vivo** mem, progresas de la subatoma al atoma neorgana vivo, al organa vivo, al animala organa vivo de la superaj bestoj ĝis la homo kun sia racio (penskapablo) kaj fine eĉ kun fantazio, kiu kapabligas lin krei tute novon. Kaj travivante kaj ekkognante tiun grandan evoluprocezon de la vivo ekestas en li la konvinko de la **senceco de la vivo**. Ĉio tio ne povas esti hazardo. Certe, ni hodiaŭuloj ne kapablas ekkogni la esencon kaj la celon de tiu senseco, sed ni povas esti certaj pri ĝia ekzistado.

Same vere grandaj religiuloj ekkognis tiun sensecon kaj priskribis ĝin laŭ siaj tiamaj konoj, nomis ĝin eble „dia regado” aŭ „dia volo”. Sed kelkaj eĉ diris simile al la seriozaj ateistoj: „La esenco de Dio ne estas esplorebla”. Tiurilate personoj kiuj sincere tradicie kredas havas la saman konvinkon kiel la seriozaj ateistoj. La unuaj utiligas ankoraŭ la historie ekestintan personigon de tiu ekkognaĵo, la ateistoj ne plu bezonas tiun helpon.

La novstila religio

En tiu religia konscio novstila kuntroviĝas la seriozaj kredantoj kaj la seriozaj nekredantoj. Ili devas kunveni, ĉar

ili estas unuanimaj en siaj fundaj strebadoj, en sia sperto de senceco kaj en sia etiko. Krome la tempo de la regado de dogmoj kaj ideologioj estas pasinta. La estonteco estas la tempo de racia pensado, kiam la homoj forlasas la grupan pensadon, ĉar ĉiuj devas kunvivi sur ĉiam malpli grandiganta tero. Dogmoj kaj ideologioj estas iloj por konservi la interesojn de grupoj kaj ili estas iloj por persistema realigo de fiksitaj direktivoj. Sed la nepra realigado de dogmoj kaj ideologioj estas problemo de potenco, kiu neeviteble kondukas al utiligo de perforto en intereso de grupo aŭ de ŝtoniĝinta doktrino.

La adeptoj de la malnovstila religio rajtas tamen kredi je siaj dogmoj. Neniu malpermesos tion al ili. Sed ili ne rajtas klopodi realigi la agnoskon de tiuj dogmoj per iaspeca perforto. Ili devas esti kontentaj, se alipensantoj komprenas tiujn dogmojn nur en amplekso de ties enhavo de realeco, do kiel simbolojn por situacio prezentata de la dogmoj.

La nekredantoj aliflanke, kiuj rifuzas la tradician religion, devas ĉiam konscii, ke la tradicia religio estas kreskinta historie, ke tiu religio prezentas al la homoj realajn helpojn en formo de klarvideblaj bildoj, ritoj, ceremonioj kaj aliaj prezentaĵoj. Tiu religio donas al multaj homoj sencon kaj konsolon por ilia vivo.

En tia spirito de komuneco ne plu ekzistas malamikeco pro diversa kredo. Unu respektas la alian, ĉar li scias: la alia volas plenumi kiel mi la Duoblan Ordonon de Jesuo, kiu estas ordono por ambaŭ, ĉar tiu ordono celas la vivon.

1. Bruno Vogelmann estas la aŭtoro de „La Nova Realismo”, verko kiu aperis en 1990 ĉe FEL (185 paĝoj, 540 BEF). En 1992 li ricevis la Deguĉi-premion de la Oomoto-Asocio kaj en 1993 la Fame-premion de la germana urbo Aalen. Bruno Vogelmann analizas kaj prezentas en tiu libro la regulojn de Nova Pensado, senmaskigas dogmojn, montras la kernon de religieco kaj la identecon de tradicia kredo kaj serioza ateismo kaj li formulas la mondkoncepton de La Nova Realismo, necesa por ebligi kunekzistadon de ĉiam pliiĝanta, en grupoj disfendita kaj konfliktkreanta homaro.

2. Kogno: konscio, kompren-kapablo.

Viajn kontribuojn por la rubriko „eseo” sendu al la eldonejo:

FEL
Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
Belgio

de Furio Gabbrielli

Lingv(aĵ)o ne danĝera, sed damne ĝena

TULLIO DE MAURO estas unu el la plej gloraj lingvistoj de Italio. En lia tuta verkaro floras unu principo kristana: doni al la povruoj lingvaĵon, por povi pli efike defendi sin per la vorto, kaj iel eviti la tenton sin turni al la perforto. Ĉi-foje lia socia engaĝo igis lin atakeliri kontraŭ la politika kaj leĝdona jargono de la registaro. Ĉi tiu, fakte, eligis apartan leĝon, nomitan „Modulo 740”, por devigi ĉiujn italojn, eĉ la tradiciajn impost-evitantojn, pagi la tributon. La intenco de la registaro estas nobla, sed la lingvistikaj meandroj per kiuj elfiltrigas la leĝo, kune kun la respektivaj reguloj pri la aplikado, estas tiaj, ke neniu, krom la plej raraj fakuloj, ion ajn komprenas. La rezulto estas, ke eĉ multaj akademianoj (kiel prof. Bolelli, fama filologo kaj prezidanto de Fondaĵo Galilei) estas devigataj turni sin al tiuj specialistoj, por plenigigi siajn impost-formularojn. Tio ne estas fabelo. En Italio, la problemo estas malnova kaj doloriga. Dum la kontraŭ-reformacio, al tiuj, kiuj ne komprenis la lingvaĵon de la Inkvizicio, oni respondadis, ke ili devas aplikati la principon *Credo quia absurdum est* (Ni kredas, ĉar ĝi estas absurda). Hodiaŭ fariĝas pli-malpli same. Per nekomprenebla lingvaĵo, oni timigas la italan impost-paganton, por pli bone premegegi tiun.

En iu senco, tio konvenas al la italoj. Ekde la 13a jarcento ĝis nun, la itala lingvo ĉiam emadas direkti sin al la aŭleska, la nobela, la kavalira, la lirika, ktp... neniam cele al la utila kaj la praktika. Pro tio, mankas al italoj homoj kiel Moliero, kaj romanistoj kiel Hugo, de Balzac kaj Zola. Jam antaŭ dudek jaroj, brava De Mauro levis sian voĉon kontraŭ ĉi tiu fenomeno kultura kaj antropologia. Hodiaŭ li levas ĝin kontraŭ la lingvaĵo de la burokratoj.

Se la babelismo de la italaj burokratoj servas por timigi la italajn amasojn, por kio servas la babelismo de Unuiĝintaj Nacioj, de Eŭropa Komunumo, de Ĝenerala Konvencio pri Dogano kaj Komercio?

UMBERTO ECO [Eko]² siaparte aperigis en la ĵurnalo *l'Espresso* amuzan artikolon pri la „bordelaĵo” (t.e. galimatjo, malordo), kiun generas en la lingvo la tiel nomata „politike ĝusta” lingvaĵo, kiu hodiaŭ estas moda. Temas pri la ridinda aspekto de la problemo, kiu jam estis reliefigita en la artikolo *La danĝera lingvo* (MONATO 1993/6, p. 21). Jen nur unu ekzemplo el la artikolo de Eco: „Kiu skribas en la angla, scias, ke jam ekde sufiĉe longa tempo, antaŭ la disvastigo de la *Politically Correct* (Politike ĝusta), leviĝis zorgigaj gramatikaj problemoj... Por eviti la teruran *chairman* (= pli-malpli prezidanto), kunmetaĵon enhavantan la horigan viran sufikson *man*, estis inventita *chairperson* (prezidulo). Tiam oni devas decidi, kiun pronomon uzi, ĉu *he* (li) aŭ *she* (ŝi) - dilemo, kiun oni povas eviti i.a. en la itala, ĉar la sola verbo sufiĉas.

Parenteze, kaj realudante al la artikolo *La danĝera lingvo*, jen informo ricevita de svisa aviadisto: Antaŭ multaj jaroj, en la svisa aerarmeo, ĉiuj ordonoj inter la piloto kaj la tero (kaj inverse) devis esti donitaj en itala lingvo, ĝuste por eviti „bordelaĵojn”.

1. Ĝenerala Konvencio pri Dogano kaj Komercio, ĜKDH (angle: GATT). (Red.)
2. Umberto Eco: itala verkisto kaj semiologo. Vidu artikolojn en MONATO 1992/7, p. 25 kaj 1993/1, p. 21.
3. Kelkaj specimenoj el la angla lingvo: „alternativa bela” (= malbela), „vertikale/horizontale defiata” (nana, malalta/dika), „speciale naturdotita” (mense subnormala). (Red.)

FAME-PREMIO 1993

DEGUĈI-PREMIO 1992

Bruno Vogelmann

La Nova Realismo

kiu montras la „regulojn” de la Nova Pensado, identecon de tradicia religieco kun serioza ateismo kaj la mondkoncepton de la estonteco kiel komuna bazo por komuna agado de la homaro.

Prof. d-ro Juan Régulo Pérez:

„... mi ne scias, kion admiri pli: la enhavon aŭ la lingvon! Rare, preskaŭ neniam mi tenis en la manoj tian libron... Resume: vi kreis grandiozan verkon.”

Esperanto-eldono: ĉe ĉiuj Esperanto-vendejoj. Prezo 30,- NLG aŭ 540,- BEF. Nacilingvaj tradukoj en 16 lingvoj. Mendo tra la Libroservo de UEA por angla, bulgara, ĉina, germana, itala, rumana, rusa.

Mendoj el nepagipovaj landoj ĉe B. Vogelmann, Pistoriusstr. 52, D-74555 Crailsheim, Germanio.

HISTORIO

La mistera morto de Christopher Marlowe

En Londono, printempe de 1593, okazis tumulto longdaŭra kaj kun gravaj sekvoj por unu el la plej famaj angloj de tiu epoko.

La tumulton kaŭzis junuloj, kiuj manifestaciis kontraŭ „fremduloj”, kriegante ke „Ili ŝtelas nian komercon”. Tio certe timigis la eksterlandanojn, kiuj venis kiel religiaj rifuĝintoj, ĉefe francaj kaj flandraj. La registaro agis tuj por ĉesigi la tumulton. Ĝi volis protekti la rifuĝintojn ĉar Anglujo vere gajnis de ili multajn novajn mediojn.

Tiutempe la sistemo registara ne similis la nunan. Eliza reĝinis kaj regis per sia konsilantaro, kiun ŝi nomis el ĉ. 30 juĝistaj „lordoj” kiuj kunvenis en la londona „Ĉambro de steloj”. Nur tiu alta juĝistaro rajtis ordoni torturadon kaj ĉiu anglo timegis ĝin. Tiu ordonis la 11an de majo 1593 ke londonaj policianoj arestu suspektatojn, kaj precipe serĉu la aŭtoron de minaca afiŝo („forpelu la fremdulojn”), kiun oni trovis sur muro de la nederlanda preĝejo. La afiŝo havis la subskribon „Tamburlaine”. Klare tio indikis la faman dramiston Christopher Marlowe [Kristof^e Marloŭ], kiu verkis furore ekscitan dramon pri Timurlenko, la orienta venkinto super la turkoj. Sed Marlowe ne troviĝis en Londono. Do, oni arestis amikon de li, Tom Kyd [Kid] kaj, kia surprizo: en la ĉambro de Kyd oni trovis dokumenton blasfeman kiu „neas la diecon de Jesuo Kristo”. Tom Kyd estis herezulo kontraŭkristana!

En la karceroj oni turmentis lin, kompreneble. Sur la streĉkadro, Tom kriis, ke la dokumenton li ne agnoskas:



Portreto de Christopher Marlowe, kies mistera morto ankoraŭ nun okupas la historiistojn.

„Ĝi apartenas al Marlo! Ni ofte verkadis kune. Liaj paperoj hazarde miksiĝis inter miaj!”

Aresto de angla patrioto

La 18an de majo la juĝistoj sendis policianon al la domo de Thomas Walsingham [Ŭólzing^em] en Scadbury Park, ĉar tie loĝis Marlowe: „Arestu tiun ĉi, konduku lin al Londono”.

La riĉa Thomas Walsingham (poste Sir Thomas) estis kuzo de Sir Francis Walsingham, antaŭa sekretario de la reĝino pri eksterlandaj aferoj. Antaŭ sia morto en 1590, Sir Francis jam dum 10 jaroj dungis multajn virojn, ekz. sian junan kuzon Thomas kaj studentojn kiel Marlowe en 1585. Li sendis ilin eksterlanden por serĉi informojn pri la malamikoj. La celo estis: protekti la vivon de la protestanta reĝino Eliza. En la nord-

franca urbo Rheims estis seminario por anglaj katolikoj. Almenaŭ unu viro tie, John Savage [Ĝon Seveĝ], ĵuris reveni al Londono por murdi la „herezulinon” Eliza. Kristoforo Marlo (kiel diplomito de la universitato en Kembriĝo) verŝajne iris al Rheims, certe deĵoris en aliaj partoj de la malamika teritorio. Li montris sin angla patrioto.

La arestito Marlo alvenis en la londona juĝejo la 20an de majo. Li klarigis, ke la hereza dokumento estas malnova tezo „arianisma” eldonita en 1549. „De tiu mi mendis kopion por refuti ĝin”. La lordoj decidis: „Ni ne tuj enkarcerigu lin, lasu lin libera kaŭcie”. Hejme en Scadbury Park sendube Marlo kaj lia aristokrata amiko Thomas diskutis kion fari. Intertempe, lia persona malamiko Richard Baines [Riĉ^ed Bejnz] sendis al la reĝino liston da akuzoj: ke Marlo

estas ateisto, blasfemisto, falsfaranto de moneroj. Baines raportis ke Marlo estus dirinta: „Tiu estas naivulo, kiu ne amaras knabojn”. Laŭ Baines: „Marlo ĉiam volas persvadi siajn amikojn al abomeninda ateismo. La buŝo de tia fiulo devus esti fermita poreterne!”.

Verŝajne Thomas Walsingham iamaniere eksciis pri tiu letero de Baines. Nun grava danĝero pri torturado minacis Marlon. Rapida reago urĝis. Merkredon la 30an de majo, okazis miraklo. Mistera miraklo. Marlo subite eskapis de la terura sorto. Li ja subite mortis! Sed kie kaj kiel??

La publiko ne estis informita, eĉ ne sciis precize kiam tiu mistera morto okazis. Hodiaŭ ni ja scias, ĉar en 1925 usona klerulo Leslie Hotson trovis raporton pri la okazintaĵo faritan de la oficiala mortenketoisto, William Danby. Laŭ tiu dokumento, iu servisto de Walsingham, laŭnome Ingram Frizer, memdefende mortigis lin dum kverelo pri „drinkokalkulo” (meze en la latina teksto de Danby estas la malnov-angla vorto *recknyng*, kalkulo). Tio okazis en Deptford, rivera haveneto inter Scadbury kaj Londono, jenmaniere: Frizer ĉe tablo en manĝoĉambro sidis inter du aliaj viroj. Malantaŭ ili Marlo kuŝis sur lito. Subite li leviĝis, kaptis la ponardon kiun Frizer kutimis porti je la dorso, kaj forte frapis ĉi-lastan sur la kapo per la ponarda tenilo. Frizer ne povis eviti la atakon kaj reage provis puŝi sian propran ponardon for, bedaŭrinde en la kapon de Marlo kiu tuj mortis. Tiun rakonton atestis la du kunuloj Nicholas Skeres kaj Robert Poley, fakte kunspionaj konatoj de Thomas kaj Kristoforo.

Same en 1925 Hotson trovis duan dokumenton: tiun per kiu la reĝino Elisabeth pardonis al la mortiginto. Oni liberigis lin post tute ne kutime mallonga mallibereco de nur kvar semajnoj! Tuj poste Thomas akceptis sian serviston en la domo de Scadbury Park...

Kio fakte okazis?

Ĉu hodiaŭ ni scias la veron pri la afero? La brita televido BBC kreis en 1985 „enketon pri la enketo” koncerne la misteran morton de Marlo. La 80 spektantoj en la televida teatro ricevis demandokartojn: „Ĉu la raporto de William Danby estas fidinda?” Nur dek jesis. El la 70 dubantoj, duono diris, ke probable iu nekonato aranĝis la mortigon pro politika intrigo. La resto respondis, ke la afero estis sukcesplena ruzo por ke Marlo povu eskapi.

Eble Frizer efektive mortigis iun en Deptford dum tiu tago, sed la kom-

patinda viktimo certe **ne** estis Marlo! Tiu jam fuĝis ŝipe kaj ĉevale al Franclando kaj pluen. Laŭ la teorio de usona historiisto, Calvin Hoffman, Kristoforo Marlo – aŭtoro de almenaŭ sep dramoj – revenis hejmen al Scadbury en 1594. Tie, kaŝe kaj kvazaŭ en malliberejo, li verkadis pliajn dramojn. Sed kion fari? Kiel eldoni ilin? Pri tio Thomas jam antaŭe klopodis mistifiki la publikon. En junio 1593 li havis preta la poemon „Venus kaj Adonis” de sia amiko. Thomas prezentis tiun al londona eldonisto, Richard Field, kiu antaŭ jaroj almigris Londonon el la fora angla vilaĝo Stratford on Avon. Kaj Field proponis kiel aŭtoron iun samvilaĝanon, kies nomon oni facile povus uzi: Ŝekspiro! Kompreneble oni ne plu reklamas la libron de Hoffman en kiu tiu teorio unue prezentigis: „La Viro kiu estis Ŝekspiro” (1957). Tom Kyd mortis mizere en 1594 kaj Marlo ĝoje renaskiĝis, tamen ne konstatis ke li suferos dudekjaran mensan turmenton.

Dum sia vivo Marlo akiris multajn malamikojn. Ne nur ĉar li havis brillan intelekton kiun enviis aliaj verkistoj. Sed ankaŭ ĉar li estis akceptita membro de selekta sekreta klubo, en kiu prezidis Sir Walter Raleigh (vojaĝisto) kaj Henry Percy (ĥemi-

isto). Antaŭe, kiam Marlo estis ankaŭ juna studento, la fama itala filozofo Giordano Bruno vizitis tiun intelektulan klubon kiu strebis esplori la mondon de novaj ideoj. La esplorantoj ne sukcesis resti daŭre kaŝitaj. La t.n. puritanoj, ekstremismaj kristanaj fundamentuloj, kune kun la regantaj klasoj timegis novajn sciencajn ideojn; ili do post 1593 direktis siajn absurdajn atakojn ankaŭ kontraŭ Marlo.

Hodiaŭ moderna aŭtoro, Charles Nicholl [Ĉalz Nik^ol], penetreme esploras antikvajn dokumentojn, ekz. pri la malamikeco inter Marlo kaj Baines. Tamen, Nicholl en sia libro „La kalkulo: la murdo de Kristoforo Marlo” (junio 1992) prezentas Marlon kiel malestimindan firponon, kvazaŭ li kredus Baines kaj la puritanajn malamikojn de Marlo. La brita „Marlowe Society” tuj respondis al Nicholl, per alia libreto „The Real Christopher Marlowe” (La vera C.M.) kiu asertas ke oni dum 400 jaroj nur kalumnias Marlon. Ni citu el Hamleto: „Estu tiel ĉasta kiel glacio, pura kiel neĝo; tamen vi ne evitos kalumnion. Leo McDONALD

Eblas kontakti la Marlo-Societon, skribante en Esperanto al ties sekretario: Leo McDonald, 26 Horace Road, Barking-side, Ilford, IG6 2BG, Britio.



Antaŭ tri jaroj naskiĝis ideo aranĝi grandan internacian folkloran festivalon „Baltica”. Ĝi devus okazi ĉiusomere en alia balta lando, Litovio, Latvio aŭ Estonio. La festivalo komenciĝis en 1990 en Litovio kaj en 1993 ĝi denove venis tien. Ĉeestis 300 partoprenantoj el 12 landoj. Inter ili estis sika vira dancgrupo el Hindio, folkloro grupo Siamsa el Irlando, svedaj trupoj Kedjan kaj Toby, kaj multaj aliaj. „Baltica '94” devus okazi en Latvio. Sur la foto latva etnografia ensemblo Bartas.

Laimius STRAŽNICAS

IRLANDO

Astronomio:

objekto de diversspecaj interesoj

Kiu el la respondoj al la demando „Kiel ekestis nia universo?” estas plej konvena, tio dependas ĉu oni havas ŝerceman, kredeman aŭ sciencan pensmanieron. Neniu ĝuste diras kio estis „unue”, kaj paroli pri „antaŭ la komenco ne estis eĉ tempo” ne helpas, ĉar nia menso ne povas imagi tion.

Sed, havante racion oni povus uzi ĝin, kaj por mi bonan eblecon tiurilate donas nia loka astronomia societo, kiu tre viglas. Oni jam instalas bonan teleskopon por observi la ĉielon, verkas novaĵleteron pri ĉielaj okazaĵoj kaj intencas kunlabori kun arĥeologoj por malkovri ĉu stranga rondforma lageto sur nia loka monto estas tombejo de meteoro. Loka observatorio estas planita kaj anoj kutime prelegas dum la dusemajnaj kunvenoj.

Sed la plej sukcesa afero ĉi-jare estis *Astrofest*, festo okazinta en nia malgranda urbo Tullamore [Tulamór] kun sia loĝantaro de proks. 9000, en meza Irlando. Kvankam la urbeto aspektas sensignifa sur la mapo, ĝi estas taŭga loko por astronomia agado. Nur 40 km for troviĝas Birr kaj kastelo, kies tria grafo Rosse en 1845 konstruigis la plej grandan tiutempan teleskopon en la mondo. Vizitis ĝin homoj el Usono, Aŭstralio kaj Rusio. La grafo malkovris kaj unue vidis spiralan galaksion.

Astrofest estis valora iniciato. Pli ol 50 personoj el multaj partoj de Irlando kaj Anglio ĉeestis. La diversaj societoj prezentis proprajn fotojn, revuojn, ktp.; estis libro- kaj vidbendovendo, du tagoj de konkursoj, diskutoj, amikeco. Okazis multaj prelegoj, kun temoj kiaj: Kiel ekestis la universo?, Kiel foti la stelojn kaj kometojn?, Pri teleskopoj kaj radia astronomio. Belegaj lumbildoj de la steloj kaj la aŭroro arkta estis projekciataj kaj se ĉiam ankoraŭ ies sciemo ne satiĝis, staris televidilo je dispono en kiu oni povis spekti vidbendan programon de la fama angla astronomo, Patrick Moore, pri la universo. Sabate post la vespermanĝo tiuj, kiuj ankoraŭ havis energion, vojaĝis iom for de la urbeto, por observadi la stelojn. Astronomio estas vasta hobio kaj do objekto de diversspecaj interesoj.

Maire NicAOIDH

LITERATURO

La gaela detektivromano

Gaston Waringhien, en sia eseo *La detektivromano*,¹ traktas tiun specon de legaĵo kiel precipan specialaĵon de la anglalingvaj popoloj. La gaeoj (kelta popolo de Irlando kaj norda Skotlando), kiuj longe vivas en proksima kontakto kun angleparolantoj, ankaŭ havas sian propran detektivroman literaturon, kvankam ĝi kompreneble estas malpli konata ol la skolo de Agatha Christie kaj Dorothy Sayers, aŭ de P.W. Crofts kaj Ellerny Queen. Oni ofte asertas, ke la keltaj lingvoj, al kies familio apartenas la gaela, estas postrestintaj antikvaĵoj, kiuj ne plu taŭgas en la hodiaŭa mondo, kiel efikaj komunikiloj. Sed la ekzisto de moderna gaela literaturo kontraŭas tiun antaŭjuĝon.

La irlanda gaela lingvo ja havas sian propran popularan detektivon – sian Poirot aŭ Maigret, sian Sherlock Holmes. Li nomiĝas Rex Carló [Reks Karló] kaj estas heroo de serio de romanoj, kiuj unue aperis antaŭ nemultaj jardekoj. Dum longa tempo tiu serio estis elĉerpita, sed eldonejo en Dublino nun decidis represi ĝin.

Trans la Irlanda Maro, en Skotlando, la plej konata aŭtoro de detektivromanoj estas Dòmhnall Iain MacIomhair [Doonal Iajn Mahkíver], kies lasta libro titoliĝas *Cò Rinn E?* (Kiu estas la kulpulo?).

Estus interese scii, ĉu verkado kaj legado de la detektivromanoj (kiuj laŭ iuj estas pli ŝatokupaj ol literaturaj aktivecoj), simile furoras inter parolantoj de aliaj malpli disvastigitaj lingvoj.

Garbhan MACAOIDH

1. La eseo troviĝas en la kolekto de eseoj *Beletro, sed ne el katedro*, en la serio „Stafeto”, eldonata de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 1987. Prezo: 630 BEF.

LUDOJ

Tangram-ovo

Al la antaŭa diskuto pri Tangram-ludoj (MONATO 89/10 kaj 91/4), jen kontribuo per Tangram-ovo. Ĝi enhavas 9 elementojn kaj kutime oni faras el ili birdon – birdoj ja elkoviĝas el ovo, ĉu ne?

Laŭ antikvaj grekoj oni rajtas kon-

strui tiajn figurojn nur per la bazaj iloj de geometrio: cirkelo kaj liniilo. Sed vi ja ne estas antikva greko kaj vi do povas uzi angulmezurilon por konstrui la angulojn.]

Jen la necesaj donitaĵoj:

AC = 15 cm;

anguloj CAD kaj ACF = 45 gradoj;



arkoj AF kaj DC havas kiel centron respektive C kaj A;

GE = GF kaj arko FD havas G kiel centron;

AJ kaj CI egalas al GF;

JK kaj IK ankaŭ egalas al GF.

Don MACKAY



Filatelo

Okaze de la centjara datreveno de la morto de fama franca verkisto, majstro pri la ĝenro de mallongaj rakontoj kaj noveloj, Guy de Maupassant (1850-1893), la franca poŝto eldonis serion da poŝtmarkoj dediĉitaj al li kaj al aliaj famaj verkistoj, kiaj Marcel Pagnol, Jean Cocteau kaj André Chamson.

Ne estas la unua fojo, ke la franca poŝto honoras literaturistojn. En 1987 kaj en 1991 estis honorataj francaj poetoj per tre belaj poŝtmarkoj.

Alberto SOLARZ

enigmo kun konkurso

NE NUR ELLI- BRA KONO PORTAS AL HOMO BONON		JAMBO- REO AK- CEPTAS LIN	LERTA	KON- STRUAĴOJ ETUL'	EFIKAS KIEL MAGNETO	STRATA SUR- KOVRAJ'	MORT- IGANT' TURKIO	MALPRA- VOS
						KEST- PEZO		
						PRON.		
	SCIO	INSTIGAS STURNO	PAROL- ADETI ĈE TABLO					INTESTO
LUD- ONTAN							GRUPE MONTRAS SIN	
VIRAJ VESTOJ				EPOPEON MALBONA				
				AKIRITA KAPABL'		MAL- ANTAŬ AKCEPTIS KRIANTE		
			JUVEL- STON'	ĈEĤ'		GAS' FARINTO		MUZIKILO
ANGULO					OST' SUR DORSO		PUBLIKAJ RILATOJ MARIANA INSULOJ	
TRANĈIS								
METAL'			MAL- MORTAJ	ARTIKOLO		KOVRIS VIZAĜON		
ALTA SENT' PRI HOMO	KURBA RELIGIAN DOKTRI- NON BRUSTA				MALSAN- IGA EN IU LOKO			ODOROJ DE BULBOJ
				NE MIAN ĈU VI LA ENIGMON ...?			MEMBRA KANT' DE FILO DE FILO	
DES- POTOJ				ILI NE PLU EKZISTAS				
					GUŜE		GEEDZIGA KUTIM'	TRINKUJ- ETAN
PERMES'								
TUŜ' DE PINTO				GRUP' DE VIRINOJ	VENKO- SIGNO	ESTRIN' DE MONAĤ- INOJ	MONO PUNE BATIS	
			DONAS POR TEMPO KAŬZE DE					
MAM- ULON EN TERO					VESTAJAN	GRUP' DE FLUGIL- ULOJ		
		RABO- BESTAJ REGN- ESTRE				AMERIKA HERBO SVEDA RADIO		
FANTA- ZIAJ				KOLEKTI FOJNON			NOTSERI' HUM'	
			PAKT'		KREDAS AL JESUO NE ŜI	13A 15A		
DELFO- RESPON- DAJN							INKLINAJ	PREP.
BIRDEJ'				SKRIB- FLUIDAJ'		BIRD- KANT'		L.P.

Sendu la daŭrigon de la frazo, kiun vi trovos en la haĉitaj ĉeloj, antaŭ la 28a de februaro 1994 al MONATO (Enigmoj), Frankrijklei 140, B-2000 Antverpeno, Belgio.

Pri t.n. bestorajtoj

de Georgo Kamaĉo

1

Vi manĝas vegetare, laŭprograme,
ĉar vi adeptas la best-aman kredon,
kaj sammotive vi rifuzas ledon
kaj vestas vin nek lane nek bril-skvame.
Samtial vi adoptis, tre best-ame,
hundredon – vi, amiko de l' planedo!
Nu, ĉu vi aŭdis, ke post sama bredo
hundo kaj pork' „inteligentas” same?
Ne miru. Miras mi, ĉar vi fieras
pri besto-amo, kaj dum-dume donas
al via hund' viandon. Vi preferas
ke via kara frandu ambrozion,
ke ŝtalo dampu bean melodion
dum kato gruntas kaj la hund' ronronas.

2


Vi nutras vin modere, sane, flaŭre,
nenian beston murdas por pluvivo,
sed se la homoj falus sur deklivo
al mort' – vi nur ridetus senbedaŭre.
Ĉu homoj estingiĝu dinosaŭre?
Vi jesas, kaj esperas kun naivo
ke post la sanga homa detruivo
regos kolombo, nun atenda kaŭre.
Ĉu hom' definitive degeneris?
Ĉu sur la tero estas hom' la nura
speci' kiu konkeris kaj generis?
Pereu homoj do... Sed hom' pereas
ĉar plej nature, lerte li obeas
regulojn de naturo diktatura.

3

Leono estas besto. Ankaŭ homo.
Leono ĉasas kaj diskarnas reĝe
gazon, kies lumbo gustas neĝe
kaj okre. Sed en via idiomo,
konvinka kaj insista ĝis ekvomo,
nur hom' kruelas, predas kontraŭleĝe.
Se eblus nun, direktus vi sieĝe
homaron al eterna nenio.
Proponu do, ke karnon ni ne voru
ne tial, ke laŭ natur-religio
maldecas (aŭ ĉu rampu ni kaj roru
ĉar vesto, vorto estas homo-traĵtoj?).
Batalu plu por nova konvencio
kaj nomu ĝin, laŭplaĉe, bestorajtoj.

4

La vorto „liberigo” klamas trompe.
Nur liberiĝo eblas. Oni devas
liberon mem akiri. Ne ricevas
ĝin tiu, kiu ne ribelas rompe.
Kiam popolon murdas hekatombe
popol', aŭ kiam toleremo krevas,
protestoj, plendoj, partizan' sin levas
impete – aŭ sapeas katakombe.
Vi pravas: facilege ni ekcedas
al nenecesaj karn- kaj sang-avidoj;
volonte per viando ni bankedas.
Se nur ni konvencius... (mia-scie
neniam marŝis manifestacie
kokinoj, porkoj, ŝafoj kaj bovidoj)!



5

Blankulo donis rajton prave plendi
al homoj aliaŭtaj. Same, poste,
al katoj kaj al hundoj, kiuj veste
salutas lin kaj igas lin kontenti.
Ĉi-tempe homoj emas transetendi
la rajton al la bestoj, kiujn roste
ni manĝis iam. Animalojn toste
regalas ni. Ĉu tamen povas senti
herbo, arbusto, arbo trunk-doloron,
ektimon, ĝojon, amon al proksima,
surprizon, izolecon kaj angoron?
Se jes – kial devigi plantojn sklavi?
Kial ni pluas gluti ilin, bavi,
kondamni ilin al infer' enzima?

6

Sur plank-kahelo aŭ sur muro, penda,
surprizas homon ombro de kunfrato,
sed li ĝin ne rekonas, kaj la blato
mortas pro frap' afekte hejm-defenda.
Kies trudiĝo estis pli ofenda:
blata aŭ homa? Homo, sen kompatato,
respondis la demandon, kvankam rato,
blato, primato estus same fremda.
Naturo post uzurpo nun pululas
la marojn kaj dezertojn de la ter'
kaj ĉion beste-plate ĝi makulas.
Ne gravas, ĉu per faŭno, ĉu per flaŭro,
ĉar estas ambaŭ, kiel minotaŭro,
varioj de protea viv-kancer'.

7

Ebenoj kaj montaroj nud-granitaj,
senombraj siluetoj sub la suno,
figuroj sen iamo kaj sen nuno,
glataj pejzaĝoj, horizontoj glitaj;
ravinoj akraj, breĉoj, klifoj splitaj,
la onda mar' (spegulo de la luno),
la lun' en ĉiu strando, ĉiu duno,
subteraj lagoj, grotoj infinitaj.
Moviĝas nur la akvo kaj la vento.
Lamento sombra de vulkano sola
eŝiĝas tra la valoj en silento.
Ĉu post sennombraj astraj rivoluoj
teron glacio regos? Aŭ ĉu fluoj
el akvo broga kaj aero bola?

8

Se fine vi verdiktis homon kulpa
kaj ĉio homa restas nur aborto;
se homoj per esploro kaj per forto
sukcesis nur la belan turni turpa;
se la hom-origin' estis perturba
kaj mava mutacio en la sorto
de ĉi planed'; se pli ol propra morto
teruras vin kunhoma viv' enurba –
tiam murdu vin mem, prefere drone
(pistoleta pafo estus tro polua),
kaj, por ke vin imitu milione
homaro noca, verku epopeon
kiu klarigu plene la kabeon
de hom' matura, pinte evolua.

anoncetoj

Mi legas Esperanton sed neniam parolas ĝin. Tial mi serĉas finnan virinon por paroli Esperanton almenaŭ dum la kvar someraj monatoj, kiujn mi pasigas kutime en bela arbaro apud llojantsi por fiŝi kaj ĉasi. Dum tiu periodo, la virino estos mia interpretisto kaj instruisto, laŭ la sistemo de gasta deĵorado (*au pair*). Dum la aliaj tri sezonoj mi vivas en Genevo, sed pasigas grandan parton de la tempo en mia ĉaledo en franca montaro, kaj en mia itala domo apud-mare. Dum tiuj sezonoj estus *mi* interpretisto. Sviso, pensiulo sed ne maljuna, bonfartulo, mi havas bonajn moralajn atestojn ankaŭ en Esperantujo. Kiu skribos al mi? Furio Gabbrielli, 18 rue de Vermont, CH-1202 Genève, Svislando.

„La nuda feino” (8 erotikaj rakontoj) ĵus aperis. La rakontoj estis verkitaj de Leopold Vermeiren, ĝis nun nekonata en Esperantujo, sed en Flandrio konata pro siaj pli ol 50 romanoj kaj pluraj novelaroj en la nederlanda lingvo. Prezo 450 BEF (ĉ. 24 guldenoj). Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Se vi havas konton ĉe FEL kun minimuma bonhavo de 450 BEF, vi ne pagas la afrankon!

Por la alsendo de uzita karto por aŭtomata pago de telefonavoko mi interŝanĝas kun poŝtfrĥa poŝtmarko kun Esperanto-temo. Mi volas pruvi, ke per Esperanto mi povas pli sukcese kolekti internaciskale. R. Verbeke, Vredestraat 66, B-8310 Brugge, Belgio.

Docento pri juro en la universitato de Loveno ŝatus korespondi pri interesaj temoj. Skribu al Prof. Dr. L. Lamine, College De Valk, Tiensestraat 41, B-3000 Leuven, Belgio.

Malprudente elspezi aŭ malkomforte tranokti? Se vi preferas la duan, petu la informilon de Gastejo Verda Lumo, 228 Capworth Street, London, GB E10 7HL, taŭga por turismi, por komerci, por festi aŭ por anonimi.

Internacie kuiri estas kuirlibro belaspekta kun receptoj el la tuta mondo. Ideala donaco por al festotagoj! Prezo 570 BEF (ĉ. 30 guldenoj). Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Se vi havas konton ĉe FEL kun kredito de minimume 570 BEF, vi ne pagos la afrankon!

Belaspektaj koloraj kartoj kun floroj kun la mencio „Gojigan Kristnaskon, feliĉan Novjaron!” haveblaj de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Prezo por 10 ekz., inkl. 10 kovertojn kaj afrankon: 450 BEF (ĉ. 23 guldenoj).

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 40 belgaj frankoj* (BEF) por unu linio (minimume 240 BEF*). Sama anonceto kvinfoje: triobla tarifo. Antaŭpago necesa. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

*Por Eŭropa Komunumo + 19,5 % AVI.

Flandra Esperanto-Ligo

havas 3817 klientojn...

1277 inter ili estas

privilegiaj klientoj.

Tiuj privilegiaj klientoj

- ne pagas afrankon kiam ili mendas Esperanto-librojn;
- ne pagas afrankon kiam ili mendas Esperanto-diskojn, kasedojn, ktp.
- kaj estas regule informitaj pri specialaj malmultekostaj ofertoj.
- Por ili FEL aŭtomate kaj sen administraj kostoj ĉiujare renovigas la abonojn de diversaj revuoj, la kotizojn de fakasocioj, ktp.
- Laste, sed ne balaste, ili povas senkoste ĝiri sumojn al UEA-kontoj kaj al FEL-kontoj kaj akcepti sumojn de aliaj pagantoj.

Kiel iĝi privilegia kliento?


Simple ĝiru rondan sumon al unu el la kontoj de FEL. La rondo sumo kovru la mendojn kiujn vi intencas fari.

Ekzemple: vi mezume aĉetas por 2000,- BEF da libroj kaj revuoj jare. Pagu do al via FEL-konto 2000,- BEF. Vi regule ricevos konteltiron kaj do scios kiam la 2000,- BEF estos foruzitaj kaj kiam estos tempo por denove „plenigi” vian konton. La bonhavo prefere restu pli ol 1000,- BEF.

La ideala donaco por viaj korespondamikoj

La donaca karto de FEL

Mendu ĉe FEL unu aŭ plurajn kartojn. La valoron de la kartoj vi mem fiksas. Sendu la kartojn al viaj amikoj, okaze de la festotagoj. Ili povas interŝanĝi la karton kontraŭ libroj, abonoj, filatelaĵoj, k.t.p.



„Stafeto”-serio prezentas

Kanto pri Minotaŭro

kaj aliaj poemoj

Gerrit Berveling

„Oni aŭdas la melodiojn de la vergiliaj heksametroj, la horaciaj kvarversoj, la sapfaj strofoj... Kiel verkisto vere esperanta, ne nur mense tradukanta, li bele ekspluatas la apartajn kvalitojn, rimedojn, grandajn permesojn de nia lingvo” (el la enkonduko de Marjorie Boulton).

„Kanto pri Minotaŭro kaj aliaj poemoj” estas akirebla ĉe ĉiuj bonaj libroservoj kaj ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Prezo ĉe FEL: 450 BEF.

ABONU KAJ ABONIGU

EL POPOLA ĈINIO

Unu el la plej popularaj revuoj en la Internacia Esperanto-Komunumo

- 12 numeroj jare, kun koloraj kaj nigrablankaj bildoj
- Informoj pri la Esperanto-movado tra la mondo
- Esperanto-rubrikoj „Voĉo de Esperantistoj”, „Por Komencantoj”, „Inter Ni” k.a.
- Aktualaj raportoj pri la progreso kaj socia kaj popola vivo de nuna malferma Ĉinio
- Interesaj artikoloj pri la tradicia kulturo, historio, literaturo, arto, medicino, filozofio k.a. de ekzotika Ĉinio.


Distribuata de la Redakcio ekde 1994

Abonebla ĉe la landaj perantoj aŭ Universala Esperanto-Asocio (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando)

Tiuj, kiuj abonas aŭ abonigas EPC dum la varba kampanjo (1993 10 01 – 1994 02 28), ricevos de la Redakcio memoraĵon.

Provnumero kontraŭ 5 internaciaj respondkuponoj kaj senpaga prospekto por 1994 haveblaj ĉe la Redakcio: P.O. Kesto 77, CN-100037 Beijing, Ĉinio.

LA GAZETO



mondkultura
sendependa
esperantisma

PETU PROVNUMERON ĈE:
LA GAZETO
55210 CREUE, FRANCIO

Ĉu vi deziras scii, ĉu hodiaŭ estas festotago en Finnlando, aŭ en Ĉinio?

Ĉu vi deziras scii, kiel telefoni al Hong-Kongo?

Ĉu vi deziras scii, kiu estas la ĉefurbo de Kazaĥio?

Ĉu vi deziras scii, kiuj estas la ĉefaj religioj de Filipinoj?

Aŭ ĉu vi simple volas noti, ke la 12an de februaro 1994 vi havas rendezuon kun ŝi?

Por ĉio tio uzu la agendon kaj enciklopedieton de MONATO:

La Jaro 1994

Mendu nun ĉe la perantoj de MONATO (adreso en p.2) aŭ rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

Esperantisto ? Certe ! Kristano ? Eble.
tiam

DIA REGNO

estas **VIA** revuo.

Mendu provexempleron ĉe Leen Hordijk,
van Hogendorplaan 4, NL-3135 CD Vlaar-
dingen, Nederlando.

SENNACIULO

Organo de

Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)

kies membroj kontribuas al kreo de mondo emancipita, tolerema, sen-antaŭjuĝa.

Aperas monate.

Petu informojn de:

SAT, 67 av. Gambetta,
F-75020 Paris, Francio.

ADJEKTIVO - CELO - DEMANDO - INFINITIVO - KOMPARO - KONDICIONALO -
KORELATIVOJ - LOKO - NEREKTA STILO - PARTICIPO - RILATAJ VORTOJ -
SUBJEKTO - TEMPO - TRANSITIVA VERBO - VOCOJ - VORTFARADO

Se vi de tempo al tempo perdas la vojon en la aplikado de esperantaj gramatikeroj, jen bona helpilo por plibonigi vian lingvoscion. Gramatika ekzercaro, laŭ la alfabeto ordigita, proponas aron da diversspecaj ekzercoj en tri niveloj pri la plej tiklaj problemoj de la plej facila lingva gramatiko en la mondo.

Referencoj al la (aperonta) ABC-Gramatiko (Internacia Versio) ebligas al la studentoj konsulti la regulojn. Uzebla en lernejo kaj kiel mempraktikilo.

Christiane De Vleminck kaj Emile Van Damme

GRAMATIKA ABC-MEMPRAKTIKILO

Eldonis: Flandra Esperanto-Ligo, prezo: 690,- BEF + afranko. Mendu ĉe la eldonisto aŭ ĉe via kutima libroservo.